




Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aprilo 2020 n-ro: 52



Merhaba,

Dünyada insanlar, sađlık alıřanları ve zellikle sađlıđımız korona virüsün tehditinden dolayı son derece zorlu anlar yařıyor. Hem kendi sađlıđımızı, hem sađlık sistemini, hem de deđerli sađlık alıřanlarımızı korumak için evde kalalım!

İřte size evde geirecek zamanınızda sizi meřgul edecek bir dergi: Turka Stelo. Bu numaranın içindeki deđiřik metinlerde muhakkak hořunuza gidecek bir ka tane bulacaksınız.

Bunların en ilgini řüphesiz ki Tempo Sigelita köřesinde arkadaşımız Konuralp Sunal'ın anlatımını yaptıđı pandemi ile ilgili üç ayrı filme dair makalesi.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


En la mondo la diversaj popoloj, la medicinaj laboristoj kaj efe nia sano trapasas malfacilan tempon minacatan de la kronviruso. Por protekti nian sanon, la sansistemon, kaj niajn karajn medicinajn laboristojn ni restu hejme!

Jen por vi nia revuo, Turka Stelo, kiu helpas vin okupiđi dum la tempo vi trapasos ene de via hejmo. Vi certe trovos kelkajn tekstojn, kiujn vi řatos el la diversaj tekstoj en i ti numero.

La plej interesa el tiuj sendube estas la artikolo de nia amiko Konuralp Sunal en lia rubriko Tempo Sigelta, kie li rakontas tri diversajn filmojn rilataj al epidemio.

Bonan legadon al iuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (e) gmail (punkto) com

eflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ciklo kun Hori Jasuo	2
Tago de la Gepatra Lingvo	3
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Mesaĝo de UEA okaze de Internacia Virina Tago, 8 marto 2020	4
Tempo Sigelita	5
HERMIONA-ORESTO-NEOPTOLEMO (ΕΡΜΙΟΝΗ-ΟΡΕΣΤΗΣ-ΝΕΟΠΤΟΛΕΜΟΣ)	6
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (parto3)	9
Historio de Karnavalo	10
JULIA SIGMOND (1929-2020)	11
Ŝercoj	12
Kurcvortenigmo	12
Amuza Matematiko	12
Aspiroj al pli homaj rilatoj	13
Papo vizitis du bombitajn urbojn	14
Franco KAFKO (Franz Kafka)	15
Provo pri kapuĉino	18
Najtingalo kaj Azeno	18
El la libro de "Dao de Jing" (43)	18
Blogo de Lingvemulo	19
Televidaj filmserioj el Turkio	20
Rememoroj	20
Internacia Literatura Esperanta Konkurso - "Hristo Gorov-Hrima" (2020)	21
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	22
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	23
Ĉerizfloraj Branĉoj en Bokalo (1976)	24
Pandemio : UMEA	24
Satiraj rakontoj -- de Sándor Szathmári	25
Neandertalaj homoj pluvivas (4)	27
Tragedio pro la atombomboj (parto 6)	29
Ni lernu Esperanton!	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32
Averto por la Homaro	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

FRUKTOARBOJ

La fruktoarboj
por ni fruktojn gardas.
Nur se eble manĝu.
Ĉiuj la sanon gardas.
Birdoj ilin prikantas.



AŬTUNO

Pejzaĝ' unika –
koloriĉec' sur la ter'.
Aŭtuna spiro.



LAGO

La lagaj okuloj
al ĉielo rigardas.
Por la varmaj tagoj
freŝecon gardas.



PETO DE SIMIETO

Bona mi estas,
inteligenta
kaj talenta.
Iam mensogema,
eĉ ŝtelema –
al vi mi similas.
Nun mi vin petas:
- Donu dolĉaĵeton
al mi, la Simieto!



verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Anonco por la 62-a Sumoo:

Karaj,

1. La 62-a Sumoo komenciĝos la 15-an de marto dimanĉon, dum 15 tagoj ĝis la 29-a.
2. Mi sendos la liston de partoprenantoj. Estas multaj partoprenantoj, do povas esti eraroj en viaj datumoj. Se vi trovos eraran informon, sciigu tion al mi. Se tio okazas, mi pardonpetas.

Listo:

Rango A: perfektaj venkintoj en la lasta sumoo

Rango B: malvenkintoj kaj ne-partoprenantoj en la lasta sumoo

Rango C: Novaj partoprenantoj

Poste aperas Listo de La Chaŭde-Fonds kaj aliaj

Niaj petoj:

1. Sendu vian rezulton al via prizorganto la 5-an, la 10-an kaj la 15-an.
2. Kiam vi sendos vian rezulton, nepre skribu viajn luktistan nomon, rangon kaj numeron, kaj la tutan rezulton. Ekzemple por la kvina tago: A-1 Horizonte oooox (o= venko, x=malvenko)

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 857 (2020-03-21)

**Mesaĝo de UEA
okaze de la
Internacia Tago por
Elimino de Rasa**

Diskriminacio, 21 marto 2020

La 21-a de marto estas la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio, ĉiujara aranĝo kiu atentigas pri la plago de rasismo. Ĉi-jare la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio fokusiĝas je la duonvoja pritakso [...]]

N-ro 856 (2020-03-19)

**Programo de la Internacia
Kongresa Universitato (IKU) en
Montrealo**

Laŭ la rekomendo de la IKU-komisiono, la Estraro de UEA decidis pri la programo de IKU kaj la Scienca Kafejo en Montrealo. Ĝis la limdato, ĉi-jare fruigita al la 15-a de januaro, la komisiono [...]]

N-ro 855 (2020-03-13)

**La dua aliĝperiodo de la UK en
Montrealo plilongigita ĝis 1-a
majo 2020 pro la koronaviruso**

La Estraro de UEA sekvas la rapide evoluantan mondan situacion de la koronavirusa epidemio, kiun en la 11-a de marto la Monda Organizaĵo pri Sano proklamis "pandemio". [...]]

N-ro 854 (2020-03-10)

**Belartaj Konkursoj de UEA
2020: partoprenu ĝis la 31-a de
marto**

De la Alvoko al partopreno en la 71-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA (aperinta en la revuo Esperanto, novembro 2019*) UEA rememorigas, ke la limdato por partopreni estas la 31-a de marto 2020. [...]]

TEJO



**Esperantistoj kaj
kronviruso**

Esperantistoj el la tuta mondo

rakontas pri la situacio en siaj landoj rilate al la kronviruso – Covid-19. [...]]

**Kontribuu al tutmonda
videorakonto en Esperanto pri
kronviruso**

TEJO ŝatus kolekti videorakontojn de Esperantistoj de la tuta mondo pri la situacio rilate al kronviruso. [...]]

**Revuo Kontakto: Tutmonda
Kaptuka Arto**

Aperis la nova numero de Revuo Kontakto, la unua de la jaro 2020! La ĉeftemo estas Tutmonda Kaptuka Arto. [...]]

**Komuniko de la IJK2020-teamo
pri la kronviruso**

"Hieraŭ la itala junulara renkontiĝo IJF anoncis sian nuligon, kaj nia teamo ricevis kelkajn demandojn pri la situacio en Nederlando. Ni havas nun neniun kialon nuligi la IJK-on. [...]]

IJK 2021 okazos en Sud-Koreio

TEJO decidis akcepti la inviton de Korea Esperanto-Junularo (KEJ) kaj ni povas oficiale anonci ke la 77-a Internacia Junulara Kongreso IJK 2021 okazos en la belega insulo Jeju, Sud-Koreio! [...]]

**La gajnintoj de Partoprenu IJK-
n 2020**

Ni ĝojas anonci la gajnintojn de ĉi-jara konkurso Partoprenu IJK-n! Dek homoj el ok diversaj landoj ricevos subtenon por partopreni la Internacian Junularan Kongreson IJK 2020 en Nederlando! Gratulojn al ĉiuj! [...]]



Leteroj de niaj legantoj



Kara amiko,

Dankon pro la bela donaco – “Turka Stelo”, marta numero, 2020. Jam delonge mi konstatis, ke “Turka Stelo” estas la plej valora nuntempa literatura Esperanto-revuo.

Jam en la aŭroro de la Esperanto-movado, d-ro L. L. Zamenhof konsciis, ke la lingvo ne povas ekzisti sen literaturo.

Dum pli ol jarcento en Esperanto estis kreitaj multaj literaturaj verkoj. “Turka Stelo” daŭrigas la bonan literaturan tradicion kaj prezentas al la legantoj verkojn de la plej talentaj Esperanto-aŭtoroj. Ne hazarde en marta numero estas verkoj de Sandor Szathmari, de L. N. Newell kaj de jam preskaŭ forgesita Tivadar Soros, dank, al kiu estis kaj ekzistis “Literatura Mondo”. En la marta numero estas eseo pri unu el la plej talentaj poetoj, Albert Goodheir. Tio montras, ke la nunaj geesperantistoj devas koni kaj ne forgesi la kreintojn de nia lingvo kaj literaturo.

Kore via,
Julian Modest



Akurate, kiel ĉiam, aperis la februara numero de “Turka Stelo”.

Ĉiam enhavoriĉa, kun kontribuajtoj el multaj landoj, senpage elŝutebla en tipo PDF, ePub kaj .mobi.

Henri Masson el Francio



Hola karaj,

Jen modelo de Esperanto revuo. Estas en ĝi kiel regulo ankaŭ kontribuajtoj el Albanio, nome poeziaĵoj de Ilir Zhiti sur paĝo 20.

Agrablan legadon...

Amike,
Bardhyl Selimi el Albanio



Karaj,

Elkore mi dankas al vi por la afabla aperigo de mia poemo!

Belega Turka Stelo!

Amike,
Maria Nazaré Laroca el Brazilo

Mesaĝo de UEA okaze de Internacia Virina Tago, 8 marto 2020



Universala Esperanto-Asocio salutas la virinojn de la mondo, precipe la anojn de la Esperanto-komunumo, okaze de Internacia Virina Tago 2020. Parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto, same virinoj kiel viroj, troviĝas en ĉiu angulo de la mondo. En sia rolo kiel internacia lingvo laboranta por rekta kaj nefiltrita dialogo inter la civitanoj de la mondo, Esperanto unike situas por ĉie helpi virinojn interkomunikiĝi trans la bariloj de distanco kaj lingvo, interŝanĝi vidpunktojn kaj ideojn kaj organizi sin ĉiuloke por agado subtene al virinoj.

Ni rekonas, ke multo farendas: egala kompenso por egala laboro, aliro al edukado, adekvataj sanservoj, jura egaleco, egala klerigo por knabinoj kaj knaboj – la listo longas. El inter ! tiuj infa noj kiuj havas aliron al edukado, tro multaj knabinoj frue forlasas la lernejon, antaŭ ol ili povas evoluigi la proprajn lertojn aŭ pretigi sin por karieroj. Kvankam Unuiĝintaj Nacioj atingas progreson, precipe per Tagordo 2030 kaj ties Celoj por Daŭripova Evoluigo, kreskantaj problemoj pro klimatsanĝiĝo, dislokiĝo, militagado kaj epidemioj subfosas tiun progreson – kaj

estas eviteblaj. Bezonataj estas pli da dialogado, pli da preteco kompromisi, pli da interkompreniĝo, inter homoj kaj registaroj ĉie. Ni parolu la lingvon de la paco.

“Veraj ŝanĝoj,” laŭ Unuiĝintaj Nacioj, “estas dolorige malrapidaj por la plimulto de virinoj kaj knabinoj de la mondo. Hodiaŭ eĉ ne unu lando povas pretendi, ke ĝi atingis genran egalecon.” Ĉehejma kaj publika perforto kontraŭ virinoj daŭras, same kiel rezisto al feminismaj sukcesoj. “Venis la tempo,” diris Ĝenerala Sekretario António Guterres lastatempe “kia! m ni ĉes u klopodi ŝanĝi virinojn kaj komencu ŝanĝi la sistemojn kiuj malhelpas ilin atingi sian potencialon.”

UEA rekonas kaj honoras la gvidan rolon de virinoj en movadoj por lingva kaj kultura revivigo, kaj por ŝirmi la endoman sferon kontraŭ subpremo kaj diskriminacio. Tiaj iniciatoj formas esencan parton de la strebado starigi mondon kie multaj kulturoj kaj lingvoj povu harmonie kunekzisti, kaj kie vera genra egaleco realiĝu.

Sekve, ni esprimas nian solidarecon kun movadoj por forigi diskriminacion kontraŭ virinoj kaj knabinoj kaj krei daŭripovan estontecon kiam ĉiuj homoj traktiĝas kun egalaj atento kaj respekto, sendepende de lingvo, kulturo, genro kaj aliaj formoj de diverseco.

Gazetaraj Komunikoj de UEA
N-ro 852 / 2020-03-03

EPIDEMIAJ FILMOJ EN LA KRONVIRUSAJ TAGOJ

Antaŭ ol mi komencis verki ĉi tiujn liniojn mi aŭdis, ke la kronviruso jam furoras tra la 97% de la mondo. La viruso montris sin unue en Ĉinio en decembro sed en ĉi tiu lasta monato ĝi fariĝis koŝmaro de ĉiuj. Ni dormas kaj vekas kune kun la kronviruso. Laŭ la amaskomunikiloj la plej efektiva lando estas Italio. La viruso unue aperis en Ĉinio tamen tio, kio nun okazas en Britio, Hispanio, Germanio, Svislando, Usono, Kanado ktp estas pli konata al ni. Laŭ la novaĵoj la viruso ne diskriminas inter la sociaj klasoj. Famaj aktoroj, futbalistoj, oficiroj, eĉ la brita princo Charles kaptis ĝin. La meza klaso, malriĉuloj, senlaboruloj, senhejmuloj, malliberuloj. La mondon ĝi buĉas. Eteta viruso skuis la mondon kaj homaron. De ĉie flugas medicinaj, filozofiaj, politikaj, strategiaj pensoj pri la kronviruso nome Covid-19. En facebook'o, en Whatsapp'o, en Twitter'o kaj similaj retoj, en retmesaĝoj oni kunhavigas konspir-teoriojn. Por kelkaj homoj tiuj estas sensecaĵoj sed tamen kelkaj el tiuj ja estas rimarkindaj. La tiel nomata kaj aplaŭdata informo-erao nun estas plena je ciferecaj rubaĵoj. La amasmedioj el la pasinteco, ĵurnaloj, radioj, televidiloj, nin daŭre bombardas kun tiaj novaĵoj. Kelkaj preferas ne plu aŭdi aŭ spekti ilin. Mia patrino, kiu jam estas 81 jaraĝa enuas pri ili. Ŝi daŭre zapas inter la TV kanaloj por trovi ion trankviligan kaj ne spekti tiajn novaĵojn, kiuj ĉie abundas. Sed mi estas multe obsedita kun tiu kronviruso kaj ĝiaj danĝeroj. Tamen ne pro homa timo sed pro la ŝanĝoj kiuj okazas kaj okazos en la homaro, kapitalisma sistemo, socia psikologio pro la tiom rapide disvastiĝanta viruso. Mi certe maltrankviliĝas pro la ĉi tiu nevidebla minaco, kiu instigas min legi kaj pensipri ĝi ĉar ni verŝajne estas en la sojlo de la turniĝo de nia erao. Mi interesiĝas pri la ŝanĝoj en la kapitalisma sistemo, en la socia psikologio. Laŭ mi la jaro 2020 fariĝos simbolo de transformiĝo post la jaroj 1789 kaj 1917. Sed la temo de Tempo Sigelita rubriko estas kino, ĉu ne? Sed pro kio mi tiom longigis ĉi tiun enkondukon? Ĉar la daŭra pensado pri Covid-19 instigis min spekti kelkajn filmojn rilataj al epidemioj.

Por la aprila numero mi verkis pri filmo de greka direktoro Theo Angelopoulos. Sed mi certas, ke se li ankoraŭ vivus, artisto kun profunda politika kaj socia sentiveco, ankaŭ interesiĝus pri ĉi tiu temo. Eble li ne filmus rekte pri la viruso mem sed pri ĝiaj konsekvencoj kaj probablecoj. Ni revenu al la tri filmoj mi elektis por aprilo.

verkis kaj sendis Konuralp Sunal el Turkio

La unua estas la korea filmo: "**Gripo**", kies originala titolo estas Gamgi. Filmo kiu komenciĝas kaj finiĝas per scenoj de savo. La diferenco inter la du scenoj estas, ke la komenca sceno temas pri la individua savo de nia heroino, kaj la fino temas pri le savo de la tuta popolo far de la filino de nia heroino. La tre rapida ritmo de tiu filmo taŭgas al tio, kio ni travivas nuntempe. Same al Covid-19, gripo (H5N1) en la filmo disvastiĝas rapide. La film



sekvencoj, kiuj okazas uno post la alia, estus troigaj se mi ne travivus tion, kio okazas nuntempe. La direktoro ŝajne ŝutis ilin unu post la alia por ke ilin empremiĝu en la filmografia tempodaŭro. Sed nuntempe preskaŭ ĉiuj popoloj travivas la saman aferon. La savisto Kang Ji-koo (Jang Hyuk) savas la junan kuracistinon (Soo Ae) el aŭto, kiu enfalis en granda fosaĵo de konstruejo. Tiel la intereso de la viro al ŝi komenciĝas kaj li fariĝas dua patro por ŝia dolĉa filino Kim Mi-reu (Min-ah Park). Sed baldaŭ komenciĝas rapida epidemio pro iu migranto kiu postvivis inter la mortintoj kaj malpuregoj de kontenero kie ili kaŝis. En la unuaj scenoj de la filmo ni vidas ciferecajn filmefektojn de la fluoj, kiuj elŝpruciĝas el la ternantaj kaj tusantaj homoj, tamen tiuj ne plu estas filmefektoj por ni nun. Ternado kaj tusado jam fariĝis paranojo por ni ĉiuj. La direktoro Sung-su Kim uzis ritmon kaj kolorojn, kiuj remeorigas la usonajn filmojn. La fikcio verkita ĉirkaŭ la dolĉa knabino krom la perfortaj scenoj, enhavas ankaŭ emociaj kaj amuzaj scenoj. Kelkfoje mi perceptis ilin kiel animaciajn film-scenojn. La procezo de amasa karanteno reduktas la identigilon de homoj al simplaj nombroj. Samkiel al tiuj de malliberuloj. Ĉiu ricevas nombron en la tendaro kie ili vivas. Ili estas apartigitaj de siaj propraj komforta kaj privata vivo en siaj apartamentoj. Homoj enfermitaj en tendaroj kaj soldatoj ĉirkaŭ ili. Ŝtato kiu montras sian feran pugnon por la publika sano. Bruligitaj korpsoj aŭ eĉ duonvivantaj korpoj. En tia epidemio ni ankaŭ >>21

Pekoĵ de gepatroj suferigas la gefilojn!" ("αμαρτίαί γονέων παιδεύουσιν τέκνα"). Tio estas tre malnova helena eldiro, ĉiam populara kaj tre ofte uzata en Grekujo. Al ĝi estas donitaj diversaj eksplikoj; alian sencon donas religiuloj, alian psikologoj, pedagogoj, divers-fakaj specialistoj, tamen, mi preferas la laikan eksplikon, ke grandaj pekoj, ĉu krimoj, ĉu seriozaj eraroj de gepatroj multe pezas sur ties idoj, kiuj, vole aŭ nevole, pli facile kaj pli ofte ol la ceteraj homoj, malobservas la regulojn de dececo, eĉ iam ankaŭ la moralan leĝon, kaj per malĝusta konduto kaj faroj, kvazaŭ instinkte sekvas vivovojon obstaklo- kaj aventur-plenan.



Mi parolas pri tio, ĉar ĉi-tie mi rakontos la aventurajn historiojn de tri personoj, idoj de brilaj herooj, protagonistoj de la helena mita epoko, stampita de la plej granda milito de ĉiuj epokoj, de la Troja Milito (Τρωικός Πόλεμος).

Unua estas Hermiona, la sola filino de Menelao (Μενέλαος), la reĝo de Sparto (Σπάρτη) kaj de Helena (Ελένη), la precipa kaŭzo de tiu terura milito. Kiam ŝia patrino forlasis sian patrujon kaj familion kaj sekvis sian amoranton al Trojo (Τροία), kaj kiam, iom pli poste, ŝia patro militiris kontraŭ sian ofenditon, Hermiona estis malgranda knabino. Ŝi restis sola, sub la zorgado de sia maljuna avo Tindareo (Τυνδάρεως), kaj tre ofte ŝi vizitis sian onklinon, la fratinon de sia patrino, Klitemnestran (Κλυταιμνήστρα), reĝinon de la najbara reĝlando kaj edzino de la plej potenca helena suvereno, la brila reĝo Agamemnono (Αγαμέμνων), estro de la tuthelena militekspedicio kontraŭ Trojo. En la palaco de Agamemnono, kie tre ofte gastis la juna Hermiona, ni renkontas la duan heroon de tiu ĉi rakontado, Oreston, la solan filon de Agamemnono kaj Klitemnestra. Tiu Oresto, iom pli aĝa ol Hermiona, volonte iĝis kunulo kaj protektanto de sia ĉarma kuzino en la infanaj ludoj kaj aventuroj, tiel, iom-post-iome en la infanaj animoj kreskis amo, ne nur gefrata,

kiu en la periodo de la flamema adoleskeco fatale iĝis pura, bela eroto. La juna paro estis feliĉa, ĝis kiam, la reĝino Klitemnestra, verŝajne ne tolerante la longan foreston de sia edzo, adultis kun alia viro, kun iu Egisto (Αίγισθος), kiun ŝi investis ŝtatestron, helpe de malamika al la forestanta reĝo politika koterio el bonvolaj perfiduloj. Post tio, Oresto ne povus resti en la prifraŭdita palaco de sia patro, do, Klitemnestra lin ekzilis forsendinte lin al la malproksima Focido (Φωκίς), ĉe la reĝo de tiu regno Strofio (Στρόφιος). Antaŭ tiu deviga disiĝo, en etoso de nigra malĝojo, Oresto kaj Hermiona interŝanĝis la unuajn kisojn kaj promesojn pri eterna amo. Poste, la junulo foriris kaj Hermiona restis en sia dezerta palaco kun sia maljuna avo.

Intertempe, en la fora Trojlando la kruela milito daŭris longe, miloj da viroj, grandaj armeestroj, gloraj militistoj kaj herooj falis sur la sangoplenaj kampoj kaj inter tiuj estis la plej granda helena batalanto, heroo kaj duondio Aĥilo (Αχιλλεύς). Kiam tio okazis, la helena armeo por la unua fojo perdis sian kuraĝon, la armeestroj en sinsekvaj kunsidoj interkonsiliĝis serĉante la taŭgan manieron, per kiu ili povus revarmigi la animforton kaj memfidon de la armeo. Estis ne nur la forpaso de la granda heroo, sed ankaŭ tio, ke ties tre brava, nevenkebla, tre signifa por la helena flanko, armeo, la armeo de la famaj Mirmidonoj (Μυρμιδόνες), kiun estris la granda heroo, restis senkapa. La konsilio de la plej superaj armeestroj estis maltrankvila, ĉiuj sciis, ke la patro de Aĥilo, la vera estro de la Mirmidonoj, Peleo (Πηλεύς), estis tre maljuna, do oni ne povis sin turni al li. La brilan ideon kaptis kiel kutime la plej inteligenta kaj sprita estro, Odiseo (Οδυσσεύς), la reĝo de Itako (Ιθάκη), kiu estis informita, ke la filo de Aĥilo, Neoptolemo, estas jam ne nur sufiĉe aĝa, sed ankaŭ same kiel lia patro brava, temerara, tre lerta militisto.

Jen, do, tiele ni atingas la trian heroon de tiu-ĉi rakontado, Neoptolemon. Kaj tiu Neoptolemo vivis en Sciro (Σκύρος), ĉe sia patrin-flanka avo Likomedo (Λυκομήδης), la reĝo de tiu insulo. Tien, do, iris Odiseo mem, kiel reprezentanto de la helena armeestraro kaj renkontis la junan reĝidon. Tiu lasta, kvazaŭ antaŭ longe preta, fervore akceptis iri al Trojo kaj partopreni la grandan militon, tamen la maljuna lia avo hezitis, li ne volis doni sian permeson. Tiam, Odiseo uzis sian grandan atuton, li trandonis la promeson de Menelao, la reĝo de la potenca Sparto,



ke post la fino de la milito, li akceptos Neoptolemon kiel edzon de sia sola filino Hermiona. La ofero estis tre granda, vere alloga, la princo de tre malgranda regno, iĝus ne nur bofilo sed ankaŭ heredanto de la trono, de la senfila Menelao, do, li estus la estonta reĝo de unu el la plej potencaj helenaj regnoj. Komprenoble, la aprobo de la avo estis donita kaj Neoptolemo iris al Trojo, kie li estis entuziasme akceptita de la Mirmidonoj, sed ankaŭ de la ceteraj armeestroj, kiuj baldaŭ konstatis, ke la junulo estas ne nur tre impeta, kuraĝa kaj lerta militisto, sed ankaŭ tre saĝa kaj kapabla por la strategiaj aferoj. Tiele, la juna armeestro rajte okupis la lokon de sia patro ne nur sur la bataltereno, sed ankaŭ en la koroj de siaj kunbatalantoj. Neoptolemo estis eksterordinare riskema kaj temerara, kaj kontraŭ siaj malamikoj li estis kruda, kruela, preskaŭ brutale sovaĝa. Dum la tuta daŭro de la milito li montris neordinaran kuraĝon kaj kondukis sian armeon al sinsekvaj venkoj. La fino venis kaj Neoptolemo estis komprenoble inter la elektitaj plej kuraĝaj militistoj, kiuj eniĝis en la Lignan Ĉevalon (Δούρειος Ίππος), kaj li estis inter tiuj, kiuj la unuaj invadis la ĉefurbon kaj la reĝan palacon de Trojo, kaj li estis inter tiuj, kiuj masakris la pli multajn reĝfamilianojn, korteganojn kaj nobelojn. Krome, la senbride impeta Neoptolemo estis tiu, kiu ekkaptis multajn noblajn virinojn, eĉ Andromaĥan (Ανδρομάχη), la fieran kaj belegan vidvinon de la plej granda troja heroo, de la unua reĝido, Hektoro (Έκτωρ), kaj li estis tiu, kiu antaŭ la okuloj de la malfeliĉa virino mortigis ŝian solan filon, bebon kiun li eltiris el ŝia brakumo. Neoptolemo estis ankaŭ inter tiuj, kiuj eniĝis en la reĝan apartamenton, kaj tiu kiu trovis la respektindan, tre maljunan, trojan reĝon, Priamon (Πρίαμος), panikitan, en la noktorobo, alkroĉiĝintan sur la sankta altaro dediĉita al Zeŭso (Ζεὺς). La kruela militisto tute ne pensante pri la sakrilegio kiun li faras, perforte detiris la maljunulon de la altaro, li trenis lin surplanke ĝis la portego de lia palaco kaj tie li senindulge lin buĉis.

Tiele la milito finiĝis kaj Neoptolemo, en gloro, riĉa je abundaj trezoroj kaj kaptitaĵoj revenis al sia patrujo, ĉe sia avo Peleo, kiu kun fiereco bonakceptis kaj oferis al sia nepo la regadon de sia regno. Inter la abundaj kaptitaĵoj de Neoptolemo estis ankaŭ la malfeliĉa, bela Andromaĥa, sklavino kaj devige kunkuŝantino de la juna reĝo.

Intertempe, ankaŭ la glora estro de la helena armeo, Agamemnono, revenis al sia patrujo, kie, tamen, atendis lin la morto. Lia adultinta edzino, Klitemnestra kaj ties amoranto surprizis kaj murdis lin tuj kiam li eniris en sian palacon.

Kiam la terura novaĵo atingis lian ekzilejon,



Oresto, dezirante venĝi sian murditan patron kaj depostuli ties uzurpitan tronon, unue petis orakolkonsilon de Apolono (Απόλλων), en la divenejo de Delfoj (Δελφοί), kaj poste, kaŝe iris al Miceno (Μυκῆναι), kie li mortigis la murdintojn de sia patro. Tamen la problemoj ne estis solvitaj, la afero ne estis simpla, la patrinmortigo estas krimo tre granda, peko tre peza, nepardonebla, do, Oresto longe suferis pro persekutado de la Erinioj (Ερινύαι), la diinoj esprimantaj la rimorson, la turmentan, daŭran konscienc-riproĉadon. Li suferis multe kaj longe. Post daŭra vagado li estis juĝita de homa kaj de dia tribunaloj kaj fine, post sukcese plenumita, tre danĝera misio komisiita al li de Apolono, li elliberiĝis, li revenis al sia brila patrujo kaj reakiris sian patran reĝan tronon.

Menelao estis la lasta, kiu revenis al sia patrujo, kunportante netakseblajn riĉaĵojn, akiritajn dum sia sufiĉe longa vagado kaj akompanate de la reakirita lia edzino, Helena. En la sparta palaco Menelao trovis sian filinon, Hermionan, kiu estis jam juna kaj tre bela virino. La renkontiĝo de la gepatroj kun sia filino estis ja emocia, tamen, iom pli poste, kiam Menelao anoncis al sia filino sian decidon kaj promeson pri ŝia edziĝo kun Neoptolemo, ŝi iĝis tre malĝojiga tragedio. Hermiona eksplikis al sia patro, ke kun la konsento de ŝia avo, Tindareo, antaŭ longe ŝi estis sin promesinta al sia kuzo, do al sia fianĉo, Oresto. Menelao, tamen, ne povis malobservi sian parolon, promeson donitan antaŭ ĉiuj helenaj suverenoj, tiel, malgraŭ la dramaj scenoj disvolviĝintaj en la sparta palaco, la malfeliĉa Hermiona estis devige sendita al Ftio (Φθία), la regno de Peleo, kie ŝi iĝis edzino de Neoptolemo. La sortobatita junulino estis devigita ne nur toleri la krudan konduton de sia edzo, sed ankaŭ daŭran, nedecan al reĝidino, humiligon. Tio okazis, precipe ĉar en apartamento de ŝia propra domo loĝis la sklavino-konkubino de ŝia edzo, Andromaĥa, kiu estis jam naskinta filon, la solan filon de Neoptolemo. Povante fari nenion por eviti sian daŭran malfeliĉon, sian daŭran sopiron al sia patrujo, al siaj malnovaj revoj kaj

al sia perdita amato, Hermiona direktis sian tutan malamon al la same malfeliĉa sklavino Andromaĥa kaj al ties infano. Fidante parolojn de malicaj sekvantinoj kaj servistinoj, Hermiona kredis, ke Andromaĥa faris al ŝi sorĉaĵojn, intencante sin mortigi. Tio plifortigis ŝian malamon kaj ŝian timon. Tute hazarde, en tiu kriza tempo, Neoptolemo decidis pilgrimvojaĝi al Delfoj, dezirante per ceremonioj, sanktoferoj kaj riĉaj konsekroj mildigi la koleron de la dio Apolono, kontraŭ kiu li estis montrinta plurfoje malpiecon. Tio donis la okazon al Hermiona sendi urĝan help-peton al sia patro. Menelao, ricevinte la leteron de sia filino maltrankviliĝis, tuj reagis kaj akompanate de malmultenombra grupo da armitaj sekvantoj iris kiel eble plej rapide al Ftio. Tie li aŭdis la plendojn kaj timojn de sia filino kaj tuj li ordonis ke oni konduku antaŭ li la danĝeran konkubinon kaj ties filon. La malfeliĉa Andromaĥa klopodadis vane dementi la malverajn suspektojn kaj akuzojn, ŝi petegadis pri la vivo de sia filo, ŝi diradis, ke ŝi estas nur sklavino de senindulga mastro, ke ŝi devige loĝas en lia palaco. Andromaĥa ploregis, petegis tamen tute vane, Menelao estis preta ŝin mortigi, kiam, informite de servistoj, alvenis la maljuna Peleo, kiu kuraĝe starinte antaŭ Menelao, riproĉe ordonis al li mallevi la ponardon. La respektinda maljunulo aŭdacis rekte minaci la brilan reĝon de la potenca Sparto, ke ĉar tiu infano estas lia sola pranepo, malgraŭ sia maljuneco li intencas ĝin defendi per la armiloj. La aspekto kaj la fieraj paroloj de la respektinda maljunulo rekonsciigis Menelaon kaj moderigis lian koleron. Sekvis saĝa diskutado kaj pritraktado de la afero, post kiu, Peleo, preninte sub sia propra protektado kaj zorgado Andromaĥan kaj la infanon, kondukis kaj loĝigis ilin al sia propra restadejo, malproksime de la ĉefa palaco kaj Hermiona. Post tio, Menelao foriris kontenta, lasinte tamen sian filinon en ankoraŭ pli malbona situacio. Nun Hermiona timis ankoraŭ pli multe, pensante pri la kruela reago de ŝia kruda edzo, kiam li informiĝus pri tio kio okazis en lia domo dum lia foresto. Ŝi estis tute malespera, tiom, ke ŝi komencis pensi eĉ pri sia memmortigo.

Kiel longe okazis ĉio tio ĉi, la tria heroo de nia rakontado, Oresto, estis enplektita en la konataj jam aventuroj kaj danĝeraj travivaĵoj. Kiam ĉio bonŝance finiĝis kaj li sidis sur sia majesta trono, Hermiona estis jam perdita. La juna reĝo estis kontenta, tamen li ne povis forgesi sian amatinon, li ne povis akcepti, ke li estis definitive perdinta ŝin. Li suferadis kaj pensadis pri ĉiaj siaj ebloj, pri ĉio, kion li povus fari. Tiam, atingis lin la informo pri la malfeliĉo kiun travivadis Hermiona en la palaco de kruela edzo kaj ne plu pensante pri io ajn, decidis perforte eltiri ŝin el la



tiranio en kiu ŝi estis allasita de sia propra patro. Akompanate de elektitaj, temeraraj viroj li tuj ekiris, li atingis Ftion, li invadis, li eniĝis sen problemoj en la fremdan palacon kaj elliberigis sian karan amatinon, kiun li kondukis en la sekurecon de sia brila palaco, en Miceno. Li faris ĉion, tute neglektante ĉiajn eblajn postsekvojn de sia ago.

Postsekvoj, tamen, ne estis, ĉar Neoptolemo, atinginte Delfojn, atingis ankaŭ la morton, kiam grupo da armitoj embuskis kaj mortigis lin ekster la divenejo. Kelkaj diris, ke la murdintoj estis gardistoj de la sanktejo, kun kiuj Neoptolemo kverelis kaj interbatiĝis. Pli poste, aliaj diradis, ke la murdintoj estis fideluloj de Oresto, tamen mi suspektas ankoraŭfoje mian amatan diinon Afroditan (Αφροδίτη), la diinon de la amo, kiu ne povus ne protekti la belan amhistorion de Hermiona kaj Oresto, kiuj geedziĝis kaj kunvivis longe harmonie kaj feliĉe. Krome, en la malproksima Ftio, la filo de Neoptolemo kaj Andromaĥa postsekvis sian praavon en la trono de Ftio, li iĝis vere bona reĝo!

-- el GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)


Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (parto 3)

(daŭrigata)



Artikolo 15

1. Ĉiu rajtas havi ŝtatanecon.
2. Al neniu estu arbitre forprenita la ŝtataneco, nek rifuzita la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon.



Artikolo 16

1. Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen ia ajn limigo pro raso, nacieco aŭ religio, rajtas edziĝi kaj fondi familion. Iliaj rajtoj estas egalaj koncerne la geedziĝon, dum la geedzeco kaj koncerne eksedziĝon.
2. Geedziĝo okazu sole laŭ libera kaj plena konsento de la geedziĝontoj.
3. La familio estas la natura kaj fundamenta grupunuoj de la socio, kaj ĝi rajtas ricevi protekton de la socio kaj de la Ŝtato.



Artikolo 17

1. Ĉiu rajtas proprieti havaĵon, kaj sola kaj en asociiĝo kun aliaj.
2. Al neniu estu arbitre forprenita lia proprieto.



Artikolo 18

Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.



Artikolo 19

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.



Artikolo 20

1. Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.
2. Neniu estu devigita aparteni al asocio.



Artikolo 21

1. Ĉiu homo rajtas partopreni la regadon de sia lando, aŭ rekte aŭ pere de libere elektitaj reprezentantoj.
2. Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando.
3. La volo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; tiu volo estu esprimata per regulaj kaj aŭtentikaj elektoj, kiuj okazu per universala kaj egala balotrajto, kaj per sekreta voĉdono aŭ ekvivalentaj liberaj voĉdonaj proceduroj.



Artikolo 22

Ĉiu, kiel membro de la socio, havas rajton je socia sekureco kaj povas postuli la realigon, per naciaj klopodoj kaj internacia kunlaboro, kaj konforme al la organizo kaj disponeblaj rimedoj de ĉiu Ŝtato, de tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiuj estas nepre necesaj por lia digno kaj por la libera disvolviĝo de lia personeco.



Artikolo 23

1. Ĉiu havas rajton je laboro, je libera elekto de sia okupo, je justaj kaj favoraj laborkondiĉoj kaj je protekto kontraŭ senlaboreco.
2. Ĉiu, sen ia ajn diskriminacio, rajtas ricevi egalan salajron pro egala laboro.
3. Ĉiu, kiu laboras, rajtas ricevi justan kaj favoran kompenson, kiu certigu por li mem kaj por lia familio ekziston konforman al homa digno, kaj kiun suplementu, laŭnecese, aliaj rimedoj de socia protekto.
4. Ĉiu rajtas formi kaj aliĝi sindikatojn por protekto de siaj interesoj.

(daŭrigata)

Karnavalo estas tradicia popola festivalo okazigita en diversaj mondopartoj, la plej festata en Brazilo. Malgraŭ la forta sekularismo aktuala ĉe la Karnavalo, la festo estas tradicie ligita al katolikismo, ĉar ĝia festo antaŭas la Lenton. Karnavalo ne estas brazila invento, ĉar ĝia origino datiĝas de antikvaj tempoj.

La vorto Karnavalo devenas de la latina, *carnis levale*, kiu signifas "forigi viandon". Ĉi tiu senco rilatas al la fastado, kiu devas fariĝi dum Lentado kaj ankaŭ al la regado de sekularaj plezuroj. Ĉi tio pruvas provon de la katolika eklezio kontroli la dezirojn de la fideluloj.

Karnavalo-Origino

Luj kleruloj komprenas Karnavalon kiel kristanan festivalon, ĉar ĝia deveno, kiel ni komprenas ĝin hodiaŭ, rekte rilatas al Lenten-fastado. Ĉi tio ne malhelpas spuri la historiajn originojn, kiuj montras al ni la influon, kiun Karnavalo suferis de aliaj partoj, kiuj ekzistis en Antikva tempo.

En Babilono, du partioj eble originis de tio, kion ni konas kiel Karnavalo. La Saceoj estis festo, dum kiu malliberulo supozis, dum kelkaj tagoj, la figuron de la reĝo, vestanta sin kiel li, manĝante sammaniere kaj dormante kun siaj edzinoj. Al la fino, la kaptito estis skurĝita kaj poste pendigita aŭ pelita.

La reĝo plenumis alian riton en la periodo proksime al la printempa ekvinokso, tempo de festado de la nova jaro en Mezopotamio. Tiu rito okazis en la templo de Marduk (unu el la unuaj mesopotamiaj dioj), kie la reĝo perdis siajn potencajn emblemojn kaj estis frapita antaŭ la statuo de Marduk. Ĉi tiu humiligo servis por pruvi la submetiĝon de la reĝo al dieco. Poste li prenis la tronon denove.

Kio estis ofta en ambaŭ partioj kaj tio rilatas al Karnavalo estis la karaktero de subfosado de sociaj roloj: la provizora transformo de malliberulo en reĝon kaj humiligon de la reĝo antaŭ lia dio. Eble, la subfosado de sociaj roloj en Karnavalo, kiel viroj maskitaj de virinoj kaj aliaj similaj praktikoj, estas asociita kun ĉi tiu mezopotamia tradicio.

La asocio inter Karnavalo kaj orgioj ankaŭ povas rilati al festoj de grekromana deveno, kiel ekzemple Bacchanalia (dionisiaj ferioj, por la grekoj). Ili estus dediĉitaj al la dio de vino, Bacchus (aŭ Dionizo, por la grekoj), markita de ebrieco kaj kapitulaco al la plezuroj de la karno.

Estis ankaŭ en Romo Saturnalia kaj Lupercalia. La unua okazis en la vintra solstico, en decembro, kaj la dua, en februaro, kiu estus la monato de inferaj

divenoj, sed ankaŭ de purigoj. Tiaj festoj daŭris tagojn, kun manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj dancoj. Sociaj roloj ankaŭ estis provizore renversitaj, kun sklavoj, kiuj estis metitaj en la lokojn de siaj mastroj, kaj ĉi tiuj estis metitaj en la rolon de sklavoj.



Kristanismo kaj Karnavalo

La festoj menciitaj estis kompreneble paganaj festoj kaj estis ege popularaj. Kun la fortigo de sia potenco, la Eklezio ne bonvenigis tiujn festojn, en kiuj homoj sin donis al sekularaj plezuroj. En ĉi tiu koncepto de kristanismo, la inversigo de sociaj pozicioj estis kritikita, ĉar, por la Eklezio, renversante la rolojn de ĉiu homo en la socio, la rilato inter Dio kaj la diablo ankaŭ estis inversigita.

La katolika eklezio do provis repensi ilin donante al ili pli kristanan sencon. Dum la Alta Mezepoko, la Lentilo estis kreita, periodo de 40 tagoj antaŭ Pasko, karakterizita de fastado. Poste la festoj okazigitaj de la homoj koncentriĝis al tiu periodo kaj estis nomataj *carnis levale*.

La Eklezio do intencis konservi daton por ke homoj faru siajn ekscesojn, antaŭ la periodo de religia severeco. Tiutempe la Karnavalo daŭris plurajn semajnojn, inter Kristnasko kaj Pasko.

Karnavalo en mezepoka kaj moderna Eŭropo



Mezepoka Mezepoka Karnavalo estis markita de festoj, bankedoj kaj multaj ludoj.

Dum mezepokaj karnavaloj, ĉirkaŭ la dekunua jarcento, dum la fekunda periodo por agrikulturo, junaj viroj, kiuj vestiĝis kiel virinoj, iris dum la noktoj sur la stratojn kaj kampojn.

Oni diris, ke ili estas loĝantoj de la limo de la mondo de vivantoj kaj mortintoj kaj invadis siajn hejmojn, kun la akcepto de tiuj, kiuj loĝis tie, ĝuante

manĝon kaj trinkaĵon, kaj ankaŭ per la kisoj de la junaj virinoj en la domoj.

Dum la Renesanco, en la italaj urboj, aperis la commedia dell'arte, improvizaj teatroj kies populareco okazis ĝis la dekoka jarcento. En Florenco, kantoj estis kreitaj por akompani la paradojn, kiuj ankaŭ havis ornamatajn aŭtojn, la Trionfi. En Romo kaj Venecio, partoprenantoj portis la baŭton, nigran kapuĉan kapon, kiu kovris la ŝultrojn kaj kapon, same kiel tri-pintajn ĉapelojn kaj blankan maskon.



Komuna Estis ofta en Reneska Italio okazigi kostumajn dancojn dum Karnavalo.

La logiko kiu regis la festojn de Antikva tempo estis la sama por la Karnavalo en Eŭropo de la Meza kaj Moderna Epoko: la mondo renversas. Sekve, ĝi estis periodo de intencita renversado de ordo, tial oni forigis limigojn al la vivo de homoj kaj renversiĝis la roloj ekzistantaj en tiu socio.

Komencante en la 16-a jarcento, estis iniciatoj trudi kontrolon pri karnavalaj festoj en la kontinento. Ĉi tiu provo de silento estis reago al la religiaj konfliktoj, kiuj trafis Eŭropon tiutempe, sed ĝi ankaŭ povas esti klarigita kiel maniero trudi socian regadon. Alia klarigo eble estas la nuna konservativismo, kiu celas demonigi popularajn festivalojn.

Karnavalo en Brazilo

La historio de karnavalo en Brazilo komenciĝis en la kolonia periodo. Unu el la unuaj manifestaĵoj de karnavalo estis la entrudo, ludo de portugala origino, kiu en la kolonio estis praktikata de sklavoj. En ĝi homoj prenis la stratojn malpuriĝante, ĵetante koton, urinon ktp. Shrovetide estis malpermesita en 1841, sed daŭris ĝis la mezo de la dudeka jarcento.

Poste venis la ŝnuroj kaj ranĉoj, balo-festoj, korsikaj kaj sambo-lernejoj. Afoxés, frevos kaj maracatus ankaŭ fariĝis parto de la kultura tradicio de la brazila karnavalo. Marchinhas, samboj kaj aliaj muzikaj ĝenroj estis korpigitaj al la plej granda kultura evento en Brazilo. Se vi scivolas pri la temo, legu nian tekston: Historio de Karnavalo en Brazilo.

Malgraŭ esti la plej populara festo en Brazilo, karnavalo ne estas brazila invento.



Karnavalo Karnavalo alvenis en Brazilo dum koloniigo kaj fariĝis la plej granda populara festivalo en la lando
[<https://www.shutterstock.com/pt/g/rodrigues>]

-- de Daniel Neves kaj Tales dos Santos Pinto,
Instruistoj pri historio

tradukis **leda Freitas** el Brazilo

JULIA SIGMOND (1929-2020)



Hungardevena rumana civitanino, emerita pupaktorino, konata Esperanto-verkistino mortis la 23-an de marto pro la koronaviruso en Piacenza, Italio. Ankaŭ ŝia edzo estis infektita kaj troviĝis en malbona sanstato. Ŝia forpaso estas granda perdo por la originala Esperanto-literaturo.

La 27-an de marto en la sama hospitalo pro la sama malsano, forpasis la edzo Filippo Franceschi, plej bone konata per la pseŭdonimo Senrodin. Li junaĝe lernis Esperanton en sia naskiĝurbo, Padova. Post emeritiĝo translokiĝis en eta vilao en la apeninoj apud Piacenza kaj tie translokiĝis Julia post ilia geedziĝo.

Nun ili kune lasis nin ĉiuj fizike, ilia memoro kaj iliaj verkoj daŭre estos kun ni.

Ŝercoj



Virta fratino (riproĉe): "Vi porko! Vi prenis la pli grandan pomon!" "Nu — kiun vi mem estus preninta, se la elekto estus al vi?"

"La pli malgrandan, kompreneble!" "Do kial brui? Ĝuste tiun vi nun havas!"

Pensu pri homoj nur bone.

Ekzemple: vidante aŭton, el kiu laŭtege sonas moderna muziko, pensu, ke la stiristo rapidas al riparejo por ripari la radion.

Edzo: - Kara, mi tuj feliĉigos vin!

Edzino: - Ho, karulo, vi vere mankos al mi!

Oni pruvis, ke golfudantoj vivas pli longe, ol kartludantoj.

Ne nur pli longe, sed ankaŭ pli bone!

- Ho, kiom bela estas via etulo! Kiaj pufaj vangetoj, saĝaj okuletoj! Li tiom similas al vi! Ĉu vi povas pruntedoni al mi kelkcentojn ĝis la tago de salajro?

- Ne, mi ne donos. Tiu estas filo de mia edzino el la unua geedziĝo.




Krucvortenigmo



Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonataj

silaboj:

BA, BE, BLI, ES, FLA, KO, KO, KU, KUR, LA, NO, PE, PER, PRO, RAN, RO, RO, SEN, SO, SO, STA, TA, TA, UR, VA, VER.



VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Rilata al urbo Montgomery; 2. Membro havanta kvin fingrojn; 3. La unua virino; 4. Surfaco generita de cirklo; 5. Rilata al aparato por telekontrolado; 7. Estinta ___ estas plej danĝera malamiko; 8. Tendenci; 9. En reĝa maniero.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. La adorata persono; 3. Teatraĵo sen paroloj; 6. Felo de ŝafoj; 7. "La ___ de la Magoj" (Leonardo da Vinci); 8. Rilata al Islama princo; 9. Teksaĵo el ŝnuroj; 10. Estinta amiko estas plej danĝera ___ ; 11. Estinta amiko estas plej ___ malamiko.

Fonto: Semajno de Enigmoj #5

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Amuza Matematiko

-- tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

La diabla ponto

Iu pigrulo volis enspezi monon sen labori. Oni sugestis lin iri al diablo por konsilo. La diablo montris lin ponton 'magian'. Se iu transpasus ĝin, ties mono duobliĝus. Sed li poste devus rekompenci la diablon per 24 dolaroj.

La pigrulo transpasis la ponton kaj konstatis, ke sia mono duobliĝis. Do li donis 24 dolarojn al la diablo. Li transpasis la ponton duan fojon kaj la mono denove duobliĝis. Kaj li ree donis al diablo 24 dolarojn. La trian fojon la mono duobligita post la transpaso de la ponto estis nur 24 dolaroj ! Tiun monsumon la pigrulo donis al la diablo.

Demando:

Kiom da dolaroj havis la pigrulo antaŭ ol li transpasis la ponton unuafoje?



Solvo


Ni inicu de la fino. 24 estis la duobligita monsumo post la tria transpaso. Do 12 dolarojn la pigrulo havis antaŭ la tria transpaso. Ni aldonu 24 dolarojn kiujn li donis al diablo post la dua transpaso, do 36 dolarojn li havis post la dua transpaso. Aŭ 18 dolarojn antaŭ la dua transpaso. Ni aldonu 24 dolarojn kiujn li donis al diablo post la unua transpaso. Restas 42 dolaroj aŭ 21 dolaroj antaŭ la unua transpaso!

Aspiroj

Aŭtoro: Lode Van de Velde
241 paĝoj A5, ISBN 9780244264208

Dorsteksto: Okazas murdo. Cirklaĵoj ondetoj ekmoviĝas sur la tereno en ĉiujn direktojn, influante la ĉirkaŭaĵon. Neniu restas netuŝita de la okazintaĵo. Jen kroniko de neanoncita murdo.

"Aspiroj" ne estas klasika detektiva romano en kiu oni serĉas la kulpinton, sed psikologia mozaik-romano kiu ekzamenas la influon je la ĉirkaŭaĵo. Atentema leganto tamen trovos la solvon./Lode Van de Velde: Aspiroj. Esperanta romano. 2020.



edzinon. La edzino Sandy same ne estis fidela al Martin. Ŝi havis amrilaton kun komsaro Steffen Moreno. La patro de Martin, Georg Krause, estas senatano, kiu verve postulas, ke la polico trovu la murdinton, tamen Georg Krause foje ne agis leĝe. Li zorgis pri tio, ke la filo de prokuroro Mikael malaperis de la listo de viroj, kiuj ĉeestis orgion kun neplenaĝaj knabinoj.

La frato de Sandy, Thomas, kiun la polico suspektas pri la murdo, estas sentaŭgulo. Li ne laboras kaj konstante petas monon de siaj fratino.

Lode Van de Velde talente priskribas la ĉiutagan enuan kaj tedan vivon de la roluloj. La romano elokvente montras kiel vivas la nuntempaj personoj, kies tagoj pasas aŭ en drinkejoj, aŭ antaŭ la televidiloj. La verkisto talente karakterizas la heroojn. Li uzas trafajn dialogojn. La roluloj konstante, preskaŭ senĉese konversacias, tamen iliaj konversacioj estas kliŝaj, ordinaraj, ĉiutagaj pri nesignifaj temoj, kio montras, ke ili ne havas seriozajn okupojn, ne interesiĝas pri gravaj vivproblemoj. La herooj estas indiferentaj eĉ pri la murdo, pri la tragedio de ilia najbara familio. Ilin interesas nur la sensacio kaj ne la tragika homa travivaĵo.

Tre bilde Lode Van de Velde priskribas la parolmanieron de la roluloj. Thomas kaj lia amiko Karl parolas ĵargone kaj la verkisto lerte transdonas tiun ĉi ĵargonon pere de Esperanto. Estas tre grave, ke en la enhavo de la romano Lode Van de Velde enplektas Esperantajn faktojn. La studento Jonas, la amanto de Hannah, la filino de murdita Martin, aĉetas Esperantajn librojn kaj verŝajne li lernas Esperanton.

La romano nepre vekos la atenton de la legantoj. Ĝi estas krimromano, kiu tamen talente priskribas la nuntempan apatian socion kaj la verkisto delikate sugestas, ke ni la homoj, devas havi pli homajn rilatojn.

Julian Modest
la 3-an de marto 2020



La originala Esperanta literaturo estas rimarkinda fenomeno. La verkistoj, kiuj verkas originale en Esperanto, loĝas en diversaj landoj, apartenas al diversaj nacioj kaj havas diversan kulturon. Per siaj verkoj ili riĉigas la Esperantan literaturon ne nur teme kaj enhave, sed per siaj specifaj mondperceptoj.

La originala Esperanta literaturo estas juna literaturo, kiu ekzistas nur pli ol jarcento kaj por ĝia evoluo necesas la apero de multaj verkoj de diversaj verkistoj. En la nuna Esperanta literaturo estas poemaroj, novelaroj, romanoj. Multaj Esperantaj verkistoj eksperimentas ĝenre. Luj el ili, kiuj verkas krimromanojn, bone konscias, ke la krimverkoj ne povas esti klasikaj, tamen la krimromanoj helpas la lingvan perfektigon de la legantoj per la simpla enhavo, alloga intrigo kaj klara flua lingvaĵo.

"Aspiroj" de Lode Van de Velde estas krimromano, tamen mi devas tuj diri, ke ĝi ne apartenas al la ordinaraj krimromanoj, malgraŭ ke la skemo estas konata. Jam en la komenco de la romano okazas murdo kaj la polico streĉe serĉas la murdinton, tamen la verkisto ne celas montri al la legantoj kiu estas la murdinto.

Lode Van de Velde starigas al si tre specifan taskon. Per la atentokapta enhavo li detale esploras kaj talente priskribas la vivon en eŭropa urbeto, kies nomo estas Novburgo. La verkisto observas la kutimojn, la vivmanieron de la roluloj, kiujn ŝokas la terura neatendita murdo. Estas murdita Martin Krause, persono, kiu havas familion, kies vivo similas al la vivo de la aliaj familioj en la kvartalo, sed post la murdo de Martin evidentiĝas, ke ne ĉio en lia familia vivo estas perfekta. Martin ofte oficveturis kaj kokris la

En Nagasaki kaj Hiroŝimo, Roma Papo alarmis la tutan mondon pri la stagnado en reduktado de nukleaj armiloj.

En la 24-a de novembro 2019, la Roma Papo, Francisco, vizitis du bombitajn urbojn, pri kiuj li daŭre interesiĝis post sia dudeka jaraĝo. Kiel Papo li vizitis la urbojn sekvinte la tiaman Papon, John Paŭlo II, en 1981. De la urboj li apelaciis neniigon de nukleaj armiloj.

Nuntempe malmultiĝas la popoloj, kiuj scias la realon de la vundoj kreitaj de atombomboj. Do, la Papo daŭre alvokas jam de antaŭe kun espero, ke la vunditoj en la urboj donus bonan instruon al venonta generacio. Nun el la du lokoj li refoje alarmis la tutan mondon pri la danĝero de nukleaj armiloj kaj konfidisian kredon pri paco al junuloj.

Jene estas resumo de lia parolado en la du urboj.

En Nagasaki:

- o Konservi nukleajn armilojn kaj amasan detruan armilaron estas ne solvo por paco kaj stabileco, kion homo esperas en la fundo de sia koro.
- o Nagasaki estas atestanta urbo; nuklea atako alportis tragedian rezulton en ne nur domoj sed ankaŭ cirkonstanco.
- o Unuflanke milionoj de infanoj kaj familianoj estas truditaj al malplisupra vivo en la socio, kaj aliflanke multaj proprajoj estas elĉerpitaj por fabriki, reformi, konservi kaj komerci armilojn, kiuj estas ĉiutage evoluantaj al pli detruaj. Tio estas eksterordinara teroro.
- o Nekalkuleblaj homoj aspiras la pacan mondon liberitan de nukleaj armiloj.
- o Por realigi idealan sennuklearmilon necesas la partopreno de ĉiuj popoloj, landoj kaj organizoj, indiferente pri posedi aŭ neposedi nukleon.
- o Kontraŭ minaco de nukleaj armiloj, ĉiuj popoloj devas respondi unuiĝinte.
- o En la nuna mondo, kie reciproka malkredemo kreskas, multiĝas la rompiĝrisko de internacia kadro, kiu limigas la uzon de armilaro. La gvidantoj de ĉiuj landoj devas klopedi tre haste.
- o Havante la kredon, ke sennuklearmilo mondo estas ebla, necesa kaj nemankebla, mi postulas al la politikaj gvidantoj jene; nukleaj armiloj ne protektas nian sekureco de la internacia aŭ enlanda minaco. Ĉiuj gravuru tion en la koron!
- o Laŭ la vidpunkto de humaneco kaj cirkonstanco, ni devas konsideri, ke la uzo de nukleaj armiloj rezultigos totalan detruon.

o Katolikismo decidas nepran plenumon por la realigo de paco inter homoj kaj landoj. Laŭ la principo de la internacia leĝo por redukti kaj sendifuzi nuklea armadon inkluzive la pakto de nuklea armilaro malpermeso, ni nesatigeble moviĝus rapide kaj alvokus.



En Hiroŝimo:

- o Mi sentis, ke mi devas viziti la (bombitan) lokon kiel pilgrimanto. Mi memoras la tutajn viktimojn. Ankaŭ mi respektas multe la fortecon kaj fierecon de la postvivantoj.
- o Uzi nuklean energion por milito estas nur krimo, sed nenio alia. Tio kontraŭas etikon. Pri tio nia dio juĝos. La posta generacio leviĝos kiel juĝisto, kiu juĝos niajn kulpojn.
- o Fabrikante la plej modernajn armilojn, ĉu oni povus paroli pri paco?
- o Fidante minacon per la teruro de nukleaj armiloj kiel la justa solvo pri konfliktoj, ĉu oni povus proponi pacon?
- o Reala paco estas en nur nearmita paco.
- o Ni devas lerni de historio. La memoro, kunpaŝo, kaj promeso, tiuj tri etikaj ordonoj havas vere pli fortan kaj universalan signifon en Hiroŝimo.
- o La nuna kaj posta generacio tute ne devas forgesi la okazintaĵon en Hiroŝimo.
- o Por certe sekurigi komunan estontecon, neniam estas antaŭe bezonata, ke speciala grupo aŭ amaso prokrasti propran profiton.
- o Alvoku elkore unuvoĉe je la nomo de viktimoj de la atombombo, nuklea eksperimento, kaj ĉiuj konfliktoj. Ne plu milito! Ne plu la bruego de armiloj! Ne plu tia ĉagreno!

Fonto: **Kobe ĵurnalo** 2019/11/25

tradukis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio



Franco KAFKO (Franz Kafka) *
La transformiĝo (parto 3)
(daŭrigata)



Kaj dum Gregoro ĉion ĉi haste eligis kaj apenaŭ sciis, kion li parolis, li facile proksimiĝis, certe sekve de la jam enlite atingita sperto, al la ŝranko, kaj provis nun, apoge de tiu ĉi sin starigi. Li volis efektive malfermi la pordon, efektive sin vidigi kaj paroli kun la

prokuristo, li estis avida ekscii, kion la aliaj, kiuj nun tiom deziris vidi lin, ĉe lia ekvido estis dirontaj. Se ili ektimus, tiam Gregoro ne plu havus respondecon kaj povus esti trankvila. Sed se ili ĉion trankvile akceptus, tiam li ankaŭ ne havus kaŭzon ekscitiĝi kaj povus, se li rapidus, je la oka horo efektive esti ĉe la stacidomo. Unue li nun kelkfoje deglitis de la glata ŝranko, sed fine li donis al si lastan svingon kaj jen staris rekte; la dolorojn en la abdomeno li tute ne plu atentis, kiom ajn ili brulis. Nun li faligis sin kontraŭ dorsapogilo de proksima seĝo, je kies randoj li sin tenis per siaj gambetoj. Sed per tio li ankaŭ atingis la sinregadon kaj eksilentis, ĉar nun li povis aŭskulti la prokuriston.

“Ĉu vi komprenis eĉ unu vorton?” demandis la prokuristo al la gepatroj, “li do espereble ne stultigas nin?” “Je dio”, kriis la patrino jam plore, “li estas eble grave malsana, kaj ni turmentas lin. Greta! Greta!” ŝi poste kriis. “Panjo?” vokis la fratino de la alia flanko. Ili interkompreniĝis tra la Gregora ĉambro. “Vi devas tuj al la kuracisto. Gregoro estas malsana. Rapide la kuraciston. Ĉu vi nun aŭdis Gregoron paroli?” “Tio estis besta voĉo”, diris la prokuristo rimardende mallaŭte kontraste al la kriadado de la patrino. “Ana! Ana!” vokis la patro trans la antaŭĉambro en la kuirejon kaj kunfrapis la manojn, “tuj venigu seruriston!” Kaj jam kuris la du knabinoj kun susurantaj jupoj tra la antaŭĉambro - kiel do la fratino sin tiom rapide vestintis? - kaj ŝire malfermis la enirpordon. Oni tute ne aŭdis la pordon klakfermi; ili certe lasis ĝin malferma, kiel kutime en loĝejoj, kie okazis granda katastrofo.

Gregoro tamen estis jam multe pli trankvila. Oni do ne plu komprenis liajn vortojn, malgraŭ ke ili ŝajnis al li sufiĉe klaraj, pli klaraj ol antaŭe, eble sekve de la

orela kutimiĝo. Sed almenaŭ oni nun jam kredis, ke lia farto ne estis tute en ordo, kaj estis preta helpi lin. La optimismo kaj certeco, kun kiuj la unuaj disponoj estis faritaj, efikis al li agrable. Li sentis sin ree enkludita en la homan rondon kaj esperis de ambaŭ, de la kuracisto kaj de la seruristo, sen vere precize distingi ilin, grandiozajn kaj surprizajn farojn. Por ricevi ĉe la proksimiĝantaj decidaj priparoladoj plej eble klaran voĉon, li iomete eltusis, kvankam penante tion fari tute obtuze, ĉar eble ankaŭ tiu bruo jam sonis alie ol homa tuso, kion prijuĝi mem li ne plu kuraĝis. En la apuda ĉambro intertempe fariĝis tute silente. Eble la gepatroj sidis kun la prokuristo ĉetable kaj flustris, eble ĉiuj sin apogis al la pordo kaj kaŝe aŭskultis.



Gregoro ŝovis sin malrapide kun la seĝo porden, maltenis ĝin tie, ĵetis sin kontraŭ la pordon, per ĝi tenis sin rekta - liaj gambetoj tenaroj havis iomete da gluo - kaj tie dum momento ripozis de la streĉado. Sed poste li ekagis por turni per la buŝo la ŝlosilon en la seruro. Bedaŭrinde ŝajnis, ke li ne havis verajn dentojn, - per kio li jam kaptu la ŝlosilon? - sed kompanse la makzeloj estis ja tre fortaj; helpe de ili li eĉ vere ekmovis la ŝlosilon kaj ne atentis pri tio, ke li sendube kaŭzis al si ian damaĝon, ĉar bruna fluaĵo eliĝis el lia buŝo, laŭfluis la ŝlosilon kaj gutis sur la plankon. “Aŭskultu nur”, diris la prokuristo en la apuda ĉambro, “li turnas la ŝlosilon”. Tio estis por Gregoro granda kuraĝigo; sed ĉiuj devintus alvoki lin, ankaŭ la patro kaj la patrino: “Vigle, Gregoro”, ili devintus voki, “nur ek, firme ek al la seruro!” Kaj ĉe la bildigo, ke ĉiuj sekvas streĉe lian penadon, li obstine per ĉiuj disponeblaj fortoj, senkonscie enmordis la ŝlosilon. Laŭ la progreso de la turniĝo ŝlosila li ĉirkaŭdancis la seruron; sin tenis nun rekta jam nur per la buŝo, kaj laŭbezone li pendigis sin je la ŝlosilo aŭ poste ĝin premis ree malsupren per la tuta pezo de sia korpo. La pli hela sono de la fine reklikanta seruro Gregoron vere elvekas. Ekspirante li diris al si: “La seruriston mi do ne bezonis” kaj kuŝigis la kapon sur la klinkon, por tute malfermi la pordon.

Ĉar li devis malfermi la pordon tiumaniere, ĝi estis vere jam sufiĉe larĝe malfermita, kaj li mem ankoraŭ ne videbla. Li devis unue sin turni malrapide ĉirkaŭ tiun pordoklapon, kaj krome tre singarde, se li ne volis, ĝuste antaŭ ol eniri la ĉambron, plumpe fali sur la dorson. Li estis ankoraŭ okupata de tiu malfacila moviĝo kaj ne havis la tempon atenti alion, jen li jam aŭdis la prokuriston eligi laŭtan “Ho!” - ĝi sonis, kiel

muĝas la vento, kaj nun li ankaŭ vidis lin, kiel li, kiu estis la plej proksima ĉe la pordo, premis la manon al la malferma buŝo kaj malrapide cedis, kvazaŭ lin forpelus nevidebla, regule efikanta forto. La patrino - ŝi staris tie malgraŭ la prokurista ĉeesto kun hararo de la nokto ankoraŭ malnodita, alte hirtiĝanta - unue rigardis kun interplektitaj manoj la patron, iris poste du paŝojn al Gregoro kaj falis planken meze de siaj ĉirkaŭ ŝi etendiĝantaj jupoj, kun la vizaĝo tute netroveble mallevita al ŝia brusto. La patro pugnigis la manon kun malamikeca esprimo, kvazaŭ li volus repuŝi Gregoron en lian ĉambron, poste ombrigis la okulojn per la manoj kaj ploris, ke lia potenca brusto skuiĝis.

Gregoro nun tute ne enpaŝis la ĉambron, sed apogis sin de interne kontraŭ la firme riglita pordoklapo, tiel ke estis videblaj lia ventro nur duone kaj supre la flanken klinita kapo, per kiu li videme trarigardis al la aliaj. Intertempe estis multe pli hele; klare videblis ĉe la alia stratflanko fragmento de la vidalvida, senfina, grize nigra domo - ĝi estis malsanulejo - kun siaj akre la fronton trarompantaj regulaj fenestroj; la pluvo ankoraŭ falis, sed nur je grandaj, ope videblaj kaj ankaŭ unuope al la tero malsupren ĵetataj gutoj. La matena manĝilaro staris superabunde sur la tablo, ĉar por la patro la matenmanĝo estis la pej grava manĝo de la tago, ĉe kiu li sidis dum horoj legante diversajn gazetojn. Ĝuste ĉe la kontraŭa vando pendis fotografaĵo de Gregoro el lia militserva tempo, prezentanta lin kiel leŭtenanton, kiel li, kun la mano ĉe la spado, senzorge ridetante, postulis respekton por siaj teniĝo kaj uniformo. La pordo al la antaŭĉambro estis malfermita, en la vestiblon de la loĝejo kaj ĝis la komenco de la malsupreniĝanta ŝtuparo.

“Nu”, diris Gregoro kaj estis bone konscia pri tio, ke li estis la sola, kiu gardis la trankvilon, “mi tuj min vestos, kunpakos la kolektaĵon kaj forveturos. Ĉu vi volas, ĉu vi volas min lasi forveturi? Nu, sinjoro prokuristo, vi vidas, mi ne estas obstina kaj mi laboras volonte; la vojaĝado estas peniga, sed sen la vajaĝado mi ne povus vivi. Kien vi do iras, sinjoro prokuristo? En la magazenon? Ĉu? Ĉu vi ĉion raportos laŭvere? Oni povas por momento esti malkapabla labori, sed ĝuste tiam estas la taŭga momento por memori pri la antaŭaj sukcesoj kaj por konsideri, ke oni poste, post forigo de la malhelpo, certe laboros des pli diligente kaj koncentrite. Mi ŝuldas ja tiom al la sinjoro ĉefo, tion vi ja tre bone scias. Aliflanke mi havas la zorgon por miaj gepatroj kaj la fratino. Mi estas en dilemo, sed mi ankaŭ reeligos min laborante. Sed ne faru tion al mi pli malfacila ol ĝi jam estas. Apogu en la magazeno mian

partion! Oni ne ŝatas la vojaĝiston, mi scias. Oni pensas, ke li gajnas freneze da mono kaj dume vivas belan vivon. Oni simple ne havas okazon por pli bone pripensi tiun antaŭjuĝon. Sed vi, sinjoro prokuristo, vi havas pli bonan superrigardon sur la kondiĉoj, ol la cetera dungitaro, ja eĉ, en konfido dirate, pli bonan superrigardon ol la sinjoro ĉefo mem, kiu en sia eco de entreprenisto en sia juĝo facile influeblas malfavore al dungito. Vi ankaŭ tre bone scias, ke la vojaĝisto, kiu estas preskaŭ la tutan jaron ekstere de la magazeno, tiel facile povas viktimiĝi de klaĉadoj, hazardaĵoj kaj senfundaj plendoj, kontraŭ kiuj sin defendi tute ne eblas, ĉar li pri ili pej ofte nenion ekscias kaj nur tiam, kiam li elĉerpita finis vojaĝon, hejme eksentas proprakorpe la malbonajn sekvojn, kies kaŭzoj ne plu eltroveblas. Sinjoro prokuristo, ne foriru, sen diri al mi vorton montrantan al mi, ke vi konstatas mian pravecon almenaŭ partete!”

Sed la prokuristo jam ĉe la unuaj vortoj de Gregoro forturniĝis, kaj nur trans la tikantan ŝultron li retrorigardis kun volbitaj lipoj al Gregoro. Kaj dum la Gregora parolado li eĉ ne momenton staris trankvile, sed retiriĝis, sen lasi Gregoron el la okuloj, al la pordo, sed iom post iome, kvazaŭ ekzistus sekreta malpermeso forlasi la ĉambron. Jam li estis en la antaŭĉambro, kaj post la subita ekmovo, per kiu li lastfoje tiris la piedon el la salono, oni povus kredi, ke li ĵus brulvundis sian plandon. Sed en la antaŭĉambro li streĉis la dekstran manon for de si al la ŝtuparo, kvazaŭ atendus lin tie vere supertera saviĝo.

Gregoro komprenis, ke la prokuriston en tiu humoro li devas neniukaze lasi foriri, se lia pozicio en la magazeno per tio ne ekstreme endanĝeriĝu. La gepatroj ĉion ĉi ne tiom bone komprenis; dum la longaj jaroj ili konvinkiĝis, ke en tiu magazeno Gregoro estis prizorgata por sia vivo, kaj krom tio ili estis tiom okupataj de la momentaj zorgoj, ke mankis al ili nun ĉia antaŭvidemo. Sed Gregoro havis tiun antaŭvidemon. La prokuriston oni devis haltigi, trankviligi kaj fine gajni; la estonto Gregora kaj de lia familio dependis ja de tio! Ke la fratino estu ĉi tie! Ŝi estis saĝa; ŝi estis jam ploranta, kiam Gregoro ankoraŭ trankvile kuŝis sur sia dorso. Kaj certe la prokuristo, tiu glantulo, lasus sin gvidi de ŝi; ŝi fermus la eniran pordon kaj en la antaŭa ĉambro persvade forigus lian timegon. Sed la fratino ja ne estis ĉi tie, Gregoro mem devis agi. Kaj sen pensi pri tio, ke li ankoraŭ tute ne konis siajn nunajn kapablojn moviĝi, sen ankaŭ pensi pri tio, ke lia parolado eble, ja eĉ verŝajne ree ne estis komprenita, li forlasis la pordoklapon; ŝovis sin tra la aperturo; volis iri al la prokuristo, kiu jam ĉe la vestibla parapeto tenis sin ridinde per ambaŭ manoj; sed tuj falis, serĉante

apogon, kun eta krio sur siajn multajn gambojn planken. Apenaŭ tio estis okazinta, li sentis unufoje en tiu mateno korpan bonfarton; la gambetoj havis firman grundon sub si; ili obeis perfekte, kiel li rimarkis je sia ĝojo; ili eĉ strebis lin forporti, kien li volis; kaj jam li pensis, ke la fino de liaj suferoj estas tuj okazonta. Sed en la sama momento, kiam li tie, balanciĝanta pro retenata movo, tute ne malproksime de sia patrino, kuŝis vidalvide de ŝi sur la planko, ŝi saltis, kiu do ŝajnis tute en si enprofundiĝinta, subite alten, kun la brakoj larĝe disaj, la fingroj disetenditaj, kriis: "Helpu, je dio helpu!", tenis la kapon klinite, kvazaŭ ŝi volus pli bone vidi Gregoron, sed kuris, kontraŭe al tio, sence reen; forgesis, ke malantaŭ ŝi staris la kovrita tablo; sidiĝis, kiam ŝi alvenis ĉe ĝi, kvazaŭ distrite, haste sur ĝi; kaj ŝajnis tute ne rimarki, ke apud ŝi el la renversita granda kafokruĉo elfluis la kafo fluege sur la tapiŝon.

"Panjo, panjo", diris Gregoro mallaŭte kaj rigardis supren al ŝi. La prokuristo estis por momento tute malaperinta el lia menso; aliflanke li ne povis sin deteni, vide de la fluanta kafo, plurfoje per la makzeloj kapti buŝon da aero. pri tio la patrino denove ekkriis, fuĝis de la tablo kaj falis en la brakojn de la al ŝi rapidanta patro. Sed Gregoro nun ne havis tempon por siaj gepatroj; la prokuristo estis jam sur la ŝtuparo; kun la mentono sur la apogrelo, li lastan fojon retrorigardis. Gregoro prenis elanon por plej eble certe kur-atingi lin; la prokuristo devis ion antaŭsenti, ĉar li faris salton super pluraj ŝtupoj kaj malaperis. "Hu!", li tamen ankoraŭ kriis, ĝi sonis tra la tuta ŝtuparejo. Bedaŭrinde tiu fuĝo de la prokuristo ŝajnis nun ankaŭ komplete konfuzi la patron, kiu ĝis nun estis relative sinrega, ĉar anstataŭ mem postkuri la prokuriston aŭ almenaŭ ne malhelpi Gregoron ĉe lia persekuto, li kaptis per la dekstra mano la bastonon de la prokuristo, kiun tiu postlasis kun ĉapelo kaj surtuto sur seĝo, prenis per la maldekstra grandan ĵurnalon de sur la tablo kaj komencis, stamfante per la piedoj, svingante la bastonon kaj la ĵurnalon, repeli Gregoron en lian ĉambron. Nenia peto de Gregoro helpis, nenia peto estis ankaŭ komprenata, kiom ajn humile li turnis la kapon, la patro stamfis nur pli forte per la piedoj. Ĉe la alia flanko, la patrino, malgraŭ la malvarmeta vetero, estis vaste malferminta fenestron, kaj ekline ŝi premis sian vizaĝon, fore ekstere de la fenestro, en la manojn. Inter la strateto kaj la ŝtuparejo estiĝis forta trablovo, la fenestrokurtenoj ekflugis, la ĵurnaloj surtable susuris, unuopaj folioj blovatis laŭlonge de la planko. Senkompate la patro pelis, kaj eligis siblajn sonojn, kiel sovaĝulo. Sed Gregoro havis ja ankoraŭ neniun sperton en retroirado, ĝi funkciis vere tre malrapide. Se Gregoro almenaŭ rajtus returniĝi, li tuj

atingus sian ĉambron, sed li timis senpacienci la patron per la temporaba returno, kaj ĉiumomente minacis ja, per la bastono en la patra mano, la mortiga bato sur la dorson aŭ la kapon. Sed fine li ne havis alian rimedon, ĉar li rimarkis kun terurego, ke retroirante li eĉ ne kapablis sekvi la direkton; kaj li do komencis, dum senĉesaj timaj flankenrigardoj al la patro, sin turni, laŭeble rapide, sed fakte ja nur tre malrapide. Eble la patro rimarkis lian bonan intencon, ĉar li en tio ne ĝenis lin, sed eĉ direktis tie kaj ie la returniĝan movon eldistance per la pinto de sia bastono. Se nur ne estus tiu neeltenebla siblado de la patro! Gregoro ĉe tio tute perdis la kapon. Li jam estis preskaŭ tute returniĝinta, kiam li, ĉiam aŭskultante tiun sibiladon, eĉ eraris kaj iom retroreturnis. Sed kiam fine li estis feliĉe kun la kapo antaŭ la porda aperturo, montriĝis, ke lia korpo estis tro larĝa por senĝene traĝi. Kompreneble, la patro, en sia nuna animstato, tute ne pensis malfermi la alian pordoklapon, por estigi por Gregoro la sufiĉan trapasejon. Lia obsedo estis, ke Gregoro nur plej eble rapide devas esti en sia ĉambro. Cetere neniam li permesintus la komplikajn preparojn, kiujn Gregoro bezonis por starigi sin kaj eble tiumaniere traĝi la pordon. Male li antaŭenpelis, kvazaŭ ne ekzistus obstaklo, Gregoron nun per eksterordinara bruoj; jam sonis malantaŭ Gregoro voĉo kvazaŭ ne nur de unu sola patro; nun vere ne estis plu ŝerco, kaj Gregoro premis sin - kio ajn okazu - en la pordon. Unu flanko de lia korpo leviĝis, li kuŝis oblikve en la porda aperturo, unu lia flanko estis tute vundfrotita, ĉe la blanka pordo restis aĉaj makuloj, baldaŭ li troviĝis blokita kaj sole ne plu povis moviĝi, la gambetoj ĉe la supre flanko tremante pendis alte en la aero, tiuj de la alia flanko estis dolore al la grundo premataj - jen la patro al li donis de malantaŭe nun vere liberigan fotan puŝon, kaj li flugis, forte sangante, ĝis la mezo de sia ĉambro. La pordo ankoraŭ batfermiĝis per la bastono, poste regis fine silento.

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***


Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>

* *Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kierling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.*

Provo pri kapuĉino

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Hispanio

-- "Do, kiel vi nomiĝas?" demandis la trinkejestro.
-- "Mi... Mikelanĝelo sinjoro. Mikelanĝelo Buonaroto" balbutis la knabo kun timo.
-- "Ĉu vi laboris en iu ajn trinkejo antaŭe?" daŭrigis la estro.
-- "Ne.. neniam antaŭe, sinjoro" respondis la aldemandito.
-- "Bone, ĉi tie ni faras multajn kapuĉinojn. Kapuĉino estas italdevena varma kafo, kun vaporŝaŭmigita lakto, kiun vi povas uzi por dekoracii la supron de la trinkaĵo. Ĉu vi volas provi prepari unu por mi kaj unu por vi?"
Kelkaj sekundoj da silento sekvis.
-- "Jes sinjoro, mi p..p.. provos" diris la knabo..
Kaj li provis!



NAJTINGALO KAJ AZENO

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Azen' sin turnis kun parol'
Al Najtingal':" Aŭskultu min amiko!
Laŭ famo en kantad' vi majstras kun efiko.
Dezirus mi pri via rol'
Mem juĝi dum vi kantos ion.
Ĉu bone majstras vi kantad-metion?"
Responde Najtingal' ekkantis por admir':
Li klakis, fajfis kun inspir'
En plej diversa form', jen en trilado dronis,
Jen mildis li en la sopir'
Kaj kiel plaĉa ŝalm' malgaje unutonis,
Jen per vibranta trem' subite li resonis
Ekregis nun atent'
Por la kantist' amata de l'Aŭroro.
Ekĉesis la zefir', de birdoj gaja ĥoro,
Kaj kuŝis grego en silent'.
Paŝtisto kun admir' aŭskulti ĉion pretis
Kaj nur por la moment'
Dum najtingala kant' al paŝtistin' ridetis.
Jen finis la kantist'. Azen' pri opini'
Deklaris: "Vere, vi ne vantas
Kaj certe sen enuo kantas.

Sed tamen tre bedaŭras mi,
Ke nian kokon ne ekkonis vi.
Vi multe en kantad' profitus,
Se nian kokon plen-imitus".
La malfeliĉa bird', post tiu juĝ-deklar',
Forflugis en rapid' trans montoj kaj kampar'.
Plensavu, Dio, nin de tia juĝantar'.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov**
(1769-1844) Rusio

tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov**
(1901-1979) Ukrainio

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofa Laocio, fondinto de Taoismo (43)

DUA PARTO - LA VIVO

68



**Jen la VIVO, kiu ne konkuremas;
jen la forto por la uzado de la homoj.
Jen la poluso, kiu etendiĝas ĝis la ĉielo.**

**Tiu, kiu bone kapablas gvidi,
ne estas militema.
Tiu, kiu bone kapablas batali,
ne estas kolera.
Tiu, kiu bone kapablas venki la malamikojn,
ne batalas kontraŭ ili.
Tiu, kiu bone kapablas uzi la homojn,
restadas malsupre.**

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Jen la VIVO, kiu ne konkuremas;
jen la forto por la uzado de la homoj.
Jen la poluso, kiu etendiĝas ĝis la ĉielo.“

La suprajn tri frazojn en Ĉinio oni komprenas plej ofte tiel,
kiel Wang Chongfang tradukis ilin:

„Tio estas nomata la Virto de nekonkuro;

Tio estas nomata la kapablo uzi alies forton;
Tio estas nomata la konformiĝo al la plej alta leĝo de la Ĉielo.“

Rimarko de Cezar

Ĉu Laocio jam povis scii, kio estas poluso? Mi iom dubas pri tio kaj pensas, ke la uzita esprimo estas de Rikardo

Vilhelmo, sed ne de Laocio. (cez)

Anniespera respondis

Jes, vi pravus. En la originalo la vorto „ji“ (fonetike) signifas „la plej“, anstataŭ „poluso“. Ĉi tie Laocio alludas „la plej altan leĝon.“

(daŭrigota)

Blogo de lingvemulo

-- el la blaga blogo

La kataluna verkisto Carles Riba diris, ke vortoj ekzistas por ke ni interkompreniĝu, ne por ke ni klopodu kompreni ilin. Mi tute konsentas, ĉar ĉiu lingvo havas siajn malklaraĵojn kaj siajn mallogikajn aferojn.

Ekzemple, la verbo “ripeti” estas sufiĉe konfuzpova. Aŭdante la aserton “mi ripetis la kanton trifoj”, oni ne bone scias, ĉu tiu kanto entute aŭdiĝis kvarfoje (semantika vero) aŭ tri (komuna sento de vero). Simila afero okazas, kiam oni uzas la esprimon “ni devas serĉi alian alternativon”. Fakte, tio signifas, ke ni jam trovis la unuan alternativon, kiu ŝajne ne funkciis, kaj pro tio oni devas serĉi “alian alternativon”, sed mi timas, ke kutime oni ne celas tion. Aldone, mi multe surpriziĝis, kiam mi rimarkis, ke ni uzas malprecize la prepozicion “sub” en la frazo: “li estis sub la akvo”. Laŭ la difino de tiu prepozicio, tio signifas, ke tiu homo troviĝis ne en la akvo, sed en kelo aŭ groto, kiu lokiĝis vere sub la nivelo de la akvo. Komprenoble, kiam oni diras: “mi estis sub la akvo dum du minutoj”, oni komprenas, ke tiu “mi” estis ene de la akvo sen spiri. Tamen, ni bone komprenos la semantikan senco aŭdante la frazon: “ni veturis per trajno sub la akvo”. Neniu imagas trajnon fiŝe moviĝantan, sed ĉiu komprenas, kio estas submarŝipo, tute malsama afero ol la menciita submartrajno. Kurioze, ĉu ne?



La scienca vero kontraŭdiras ankaŭ tiun ŝablonan uzadon de la esprimo “en la mezo de la uragano”. Fakuloj pri tiuj naturaj fenomenoj asertas, ke tiu punkto estas tute kalma loko. Sed, kiel asertas la ĉefrolulo de la lasta romano de Umberto Eco, Numero Zero (2015), ĵurnalistoj devas uzi ne la veran senco de iu ajn el tiaj dusencaj esprimoj sed tion, pri kio la legantoj kredas, ke ĝi estas la vera senco.



Ankaŭ la adjektivo “lasta” povas kaŭzi miskomprenojn. Ekzemple, nun, post la forpaso de la itala verkisto, la frazo “la lasta romano de Umberto Eco” havas tute malsaman signifon ol ĝia origina senco, ĉar kiam mi skribis la skizon de tiu ĉi artikolo – antaŭ lia morto – mi volis nur celi “la plej novan romanon” de la mondfama semiotikisto.

Precize en la senco “la plej nova”, vi havas antaŭ vi la “lastan” blagan blogon. Tamen, se nia kara redaktoro enuiĝas pro miaj stultaĵoj kaj troa ripetado, eble li sendos min en la mezon de la uragano aŭ ĵetos min subakven kaj serĉos alian alternativan rubrikon por tiu ĉi paĝo kaj, finfine, tiu artikoleto estos vere la lasta de ĉi-tiu serio.

verkis **Viktoro SOLÉ** el Katalunio

Fonto: “La blaga blogo”, revuo **Kontakto**, #275, 2016:5, p.15

32>> malriĉuloj. La unua grupo ne scias kion fari kun la mono kaj estas inerta, nekapabla vidi la neprecon de ŝanĝoj kaj la dua estas tiom premita en sia malriĉeco ke ĝi ne havas tempon pensi pri io ajn krom la pura ekzistado. Kaj pro neceso akumuli kapitalon (ne sciante kial) ekestis ekologie detruita mondo. Ĉu ne plu riparebla?

Sed individuaj pensuloj jam trovis solvojn kontraŭ kiuj agas tiuj kiuj havas potencon de kapitalo.

Unua fazo: Enkonduko de deviga universala salajro. Ekzistas tre bona studo kiu bele ilustras ke tio tute ne estas utopio kaj ke la nunaj evoluintaj landoj, kun pli ol duono de la homaro, povas senriske fari tion. Ĉiu havos bazan salajron por funkciado sen ie

ajn formale havi laborpostenon. En Svislando oni eĉ havis referendumon en kiu tiu sumo estis proponita pli ol 3.000 frankoj po persono monate. La plej malriĉaj landoj de Eŭropo povus disponigi por tio minimume 300-400 eŭrojn.

Dua fazo: krei ekonomian sistemon en kiu homoj diferenciĝos ne per kvanto de mono posedata sed per kvanto de mezurunuoj kiuj montros ĉies kvanton de scio akirita. Baze de tio estos distribuata gvidpotenco en la socio.

La konsorcio de saĝuloj trovu vojojn por ekapliki ĉi tion sen sociaj konfliktoj, sen politiko kiu ligiĝas al pasioj kaj organizas la socion baze de politikaj partioj kiuj prezentas intereson de unuopaj grupaj egoismoj. >>31

Televidaj filmserioj el Turkio

Mi loĝas en vilaĝo kie mankas teatro, opero, muzeo kaj aliaj eblecoj de la kultura pasigo de libertempo. Ekzistas biblioteko kaj televidilo. La satelitaj elsendoj estas multnombraj, tamen mi trovas malfacile vere bonajn elsendojn, ne nur amuzilojn. Komprenible, la gustoj estas diversaj. Viroj preferas elsendojn pri konkursoj de aŭtomobiloj, futbalmatĉo, filmojn pri krimoj ktp.

Fakte mi komprenas, ke viroj kaj virinoj havas malsamajn interesojn, gustojn.

La virinoj ĝenerale preferas filmseriojn pri la vivo de familioj.

En mia lando estas tre popularaj la turkaj filmserioj, ankaŭ mi tre ŝatas ilin. La plej atendata horo de la tago estas por mi tiu, kiam komenciĝas la turka filmserio. Mi spektis multajn kaj povas diri, ke mi ekamis ankaŭ la geaktorojn, kiuj donacis al mi tiom da agrablaj horoj. La agadoj de tiuj filmserioj estas interesaj, la bildoj pri Istanbul belaj, sed plej multe plaĉas al mi, ke la enhavo ne celas nur la amuzigon de la spektantaro. Mi tre ŝatis ekzemple la filmseriojn VATANIM SENSIN, KIRGIN CICEKLER, ne parolante pri la fama SULEJMAN. Ĉiuj turkaj filmserioj havas ankaŭ moralan substraton. Nuntempe la „moraligo“ estas malmoda, kvazaŭ la junularo ne bezonus moralan kompason. En la ĉiutaga vivo abundas fiagoj

verkis kaj sendis Lenke Szász el Rumanio

neimageblaj antaŭ duonjarcento: Lernantoj kaj instruistoj estas agresataj eĉ mortigitaj ene de la lernejo, lernantoj primokataj de samklasanoj memmortigas, lernanto pikas plurfoje la instruistojn, kiu ne donis la atenditan kalkulon al li – estas nur kelkaj ekzemploj. Ĉu vere la junularo ne bezonas moralan instruon, ĉar ĉio estas en ordo? Mi kredas, ke ne nur al la junularo, sed ankaŭ por la maturaj spektantoj estas bonvena helpo por orientiĝi en la rapide ŝanĝiĝanta mondo. Por needukita homo demokratio signifas: „Mi rajtas fari kion mi volas!“ Mankas la eduko, gravas nur la scio, kaj la muziĝo.



En la turkaj filmserioj ne temas pri teda moraligo, male: La spektanto vidas, ke iu el la rolantoj sekvas erarvojon, foje ankaŭ la rolanto komprenas sian eraron. Ne ĉio iras rapide, supraĵe, kiel en alilandaj filmoj. En la turkaj filmserioj estas homaj sentoj, homaj rilatoj. Mi ne volas kompari la turkajn filmojn kun produktoj de konkretaj aliaj landoj, ne volas ofendi aliajn naciojn. Mi deziris nur esprimi mian dankemon al la produktantoj de tiel bonaj filmserioj kaj al la geaktoroj. Ili donacas multan plezuron al miloj da spektantoj tutmonde. Estu benataj!

verkis kaj sendis Lenke Szász el Rumanio

Rememoroj

verkis kaj sendis Gafur Gazizi el Baŝkortostano


Mi lastatempe penas relegi la konservitajn antikviĝantajn netipografajn eldonaĵojn en Esperanto. Mi havas da ili sufiĉe multe por lanĉi verkadon de libreco pri la vivo kaj aktivadoj de esperantistoj en Uralio kaj Sovetio. Relegante la grizajn duonlegeblajn rotoprintaĵojn, mi fojfoje trovas interesajn artikolojn aŭ notojn. Fakte, en la Urala regiono dum la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento bolis sia propra specifa vivo de Esperantistoj. Unu el la ĉefaj motoroj (da tiuj motoroj estis tre multaj en Uralio) de tiu kvazaŭa Uralia Esperanto-respubliko estis la Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka, nun loĝantaj en la alia regiono. Do, bonsanu kaj prosperu ili.

Kaj nun mi volas prezenti por ekzemplo eltiraĵon el la jam antikva eldonaĵo "Ekzakte"(informletero de uralaj esperantistoj) № 1/37 1989 paĝo :

1. "...Ekspansio. En la eta Litovio funkcias ĉirkaŭ 40 e-istaj kluboj, dum en la giganta Uralo (kies loĝantaro kvinoble superas la litovian) estas nur 20. Tiu situacio ne takseblas normala. Ni penu fondi po unu klubo/rondeto en ĉiu urbo kun pli ol 100 mil loĝantoj. La unuaj celoj de nia projekto estas Kurgan,

Kamensk-Uraljskij kaj Pervouraljsk, kie UES (Urala Esperanta Societo) planas korespondan instruadon kaj ĉian helpon al la eklernintoj. Dekoj de lernantoj el Kurgan jam anoncis sin post la artikolo de V. Kudrjavcev en "Sovetskoje zauralje". Do, ne hezitu publici nian adreson en via gazetaro - ĉiu deziranto povas tra la koresponda kurso de UES lerni la zamenhofan lingvon."

(fintajpita de redaktoro Aleksandr Zagvazdin en 27.03.1989)



Internacia Literatura Esperanta Konkurso - "Hristo Gorov-Hrima" (2020)

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **rakonto kaj eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu

subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj



La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2020 al adreso: e-mail: modest@abv.bg aŭ per la poŝto al adreso:

Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario

5 >> povas esti reduktitaj al "nulo". Precipe tiel, kiel estas priskribita en konspiraj teorioj, ni povas esti hakitaj se ni akceptas esti blatigitaj same al ŝafoj en cifereca kaj monolitika ŝtato. Plaĉas spekti tiajn katastrofajn filmojn dum manĝado kaj trinkado en ordinaraĵoj. Tamen, en ĉi tiuj kronvirusaj tagoj, ni certe sentos profunde la hororojn de ĉi tiu filmo. La filmo alproksimiĝas al ĝia fino kun optimisma kaj promesplena sceno same al la filmoj de Frank Capra. La knabineto portas antikorpojn en sia sango pro la vakcino far de sia patrino, kiuj malebligas la disvastiĝon de la epidemio. Konfliktoj inter la medicina profesoro kaj de la guberniestro kaj aliaj registaraj oficistoj, kaj de la prezidanto kaj la usona oficisto en la finaj momentoj de la filmo aldonas streĉon kaj guston al la fikcio. Sukcesa filmo.

La dua filmo estas itala-usona filmo de la jaro 1964 **"The Last Man on Earth"** (La lasta homo sur la tero). La filmo estas adaptiĝo de la romano "I am a Legend" (Mi estas legendo) de Richard Matheson. La turka titolo de la filmo estis "Hepimiz Vampiriz" (ni ĉiuj



estas vampiroj). Tre taŭga por la enhavo de la filmo ĉar en la tuta filmo ni vidas mortintoj kiuj nokte restariĝas, atakas, kaj daŭre batas la pordon kaj fenestrojn de nia heroo Robert Morgan. La vampiroj timas la ajlo-aretojn kaj ankaŭ la spegulojn, kiujn li pendigas sur la pordo kaj fenestroj. Tiuj kreitaĵoj ankaŭ rememorigas al ni la zombiojn. Post la morto de ĉiuj loĝantoj en la urbo pro la pesto (tamen ne en la tuta mondo, kvankam la titolo estas tia, ni nur spektas la okazaĵojn en nur unu urbo en Usono tra la tuta filmo), Morgan devas daŭrigi sian vivon tutsole. Monotona vivo. Matene vekigigas kaj forstrekas unu plian tagon sur la kalendaro, trinkas sian kafon, matenmanĝas, faras alvokon pere de la radioaparato esperante, ke estas aliaj, kiuj ankoraŭ vivas, provas kontakti ilin, trovas benzinon por sia aŭto, vagas tra la malplenaj merkatoj, prenas ajlojn, prenas manĝaĵojn ktp, revenas hejmen antaŭ ol noktiĝo, metas la aŭton en la garaĝon, pendigas ajlojn kaj spegulojn sur pordoj kaj fenestroj por savi sin el la zombioj!!! Vivo ja estas dolĉa sed mi ne ŝatus esti la lasta viro enspiranta sur la tero tiele. Ĉu vi? Nia heroo en la komenco forstrekante tagon sur la kalendaro diras ke jam pasis tri jaroj. Pensu! Tri jaroj, kun neniu ĉirkaŭ vi, eĉ nek hundo kaj nek kato. Poste li trovas iun hundon. Kaj nokte tiuj "marŝantaj mortintoj"!!! Mi mem dezirus esti en la flanko de la zombioj. En la mezo de la filmo ni spektas la pasintan vivon de Morgan pere de rapidaj retrorigardoj ("flashback"). Li estas kuracisto kaj laboras kiel mikrobiologo en iu instituto. Li havas feliĉan geedzecon, kaj unu belan filinon. Ankaŭ ĉi tie same al la antaŭa filmo troviĝas imago de knabino. Lia amiko Ben, iutage montras al li ĵurnalan artikolon: La novaĵo de la pesto, kiu atingos Usonon el Eŭropo pere de la vento. Morgan ne zorgas pri tio. Iutage ili >>>30

Grabowski – la patro de la esperanta poezio

En mia artikolo pri Zamenhof mi substrekis la gravecon de liaj verkoj por la ekevoluo de la Esperanta literaturo. Lia verkaro estas kaj abunda kaj diversa. Liaj originalaj verkoj koncernas la lingvon mem, la Esperanto-movadon kaj beletron. Junaj esperantistoj devas frue konatiĝi kun liaj malmultaj poemoj, kiuj okupas ian sanktan lokon en nia tradicio. Kaj, iom post iom, ili devas legi ankaŭ liajn prozajn verkojn.



Mi volas aparte atentigi pri la ok paroladoj, kiujn faris Zamenhof okaze de la inaŭguroj de la Universalaj Kongresoj 1905-1912. Por akiri klasikan stilon de klareco kaj riĉa enhavo pleje indas zorge legi tiujn paroladojn. Tio ne signifas, ke nepras provi imiti la stilon de Zamenhof. Sed profunda kono de lia stilo estas la fundamento, sur kiu oni povus evoluigi sian propran stilon – se oni deziras fariĝi verkisto en Esperanto.

Nun mi volas turni min al alia grava verkisto el la fruaj jaroj de Esperanto. Sed unue mi deziras rakonti al vi memoraĵon el mia propra esperantista vivo. Mi eklernis Esperanton en mia 17-a jaro. Baldaŭ poste mi hazarde ekhavis mian unuan beletran libron en la lingvo. Ĝi estis poemaro kun la titolo El Parnaso de Popoloj, eldonita en Varsovio en 1913. Tiu poemaro enhavas ses originalajn poemojn de la polo Antoni Grabowski kaj liajn tradukojn de poemoj el 30 lingvoj. Ĉiun poemon akompanas signoj por montri ĝian metrikan skemon kaj ĉiu tradukita poemo estas enkondukita per komencaj versoj en la originala lingvo.

La tuta aspekto de la libro elspiris por mi ian seriozan aŭtentikon, kiu vekis profundan respekton por la lingvo, kiun mi estis lernanta. Tiom forta estis la altirpovo de tiu libro, ke mi tuj devis provi eklegi kaj kompreni, kvankam mi fakte ne estis tiam fininta la lernolibron mem! Kaj mallonge dirite: Tiu poemaro de Grabowski inicis min definitive en la lingvon, en ĝian spiriton kaj ĝiajn respektindajn meritojn. Ĉiam poste mi amis Grabowski, kaj neniu alia Esperanta verkisto sukcesis forpreni por si lian lokon en mia koro. Tiom forta estis tiu juneca impresio.

Sed kiu estis Grabowski? Li estis polo, naskiĝis

en 1857, mortis en Varsovio en 1921. Profesie li estis kemia inĝeniero kaj verkis fakajn librojn en la pola lingvo. Li estis poligloto, kiu konis kaj regis pli ol dudek lingvojn. Li tradukis, en tre malfacilaj cirkonstancoj de malsano kaj soleco, la nacian epopeon de la Poloj, Sinjoron Tadeon, en Esperanton, dekmilversan grandverkon, – fortostreĉo apenaŭ imagebla. Laŭdire, la unua interparolado en Esperanto okazis, iam en 1888, inter Grabowski kaj Zamenhof, en la loĝejo de Zamenhof ĉe strato Dzika numero 9 en Varsovio. Tiuj du fariĝis intimaj amikoj, kiuj spirite subtenis unu la alian.

Ho jes, Grabowski estis ja unuavice tradukisto. Tamen, pro la graveco de liaj poeziaj tradukoj oni kutime nomas lin “la patro de la Esperanta poezio”. Liaj originalaj poemoj estas malmultaj. Tamen unu estas same bone konata inter la esperantistoj kiel La Vojo de Zamenhof. Ĝi nomiĝas La Tagiĝo. Ĝi estas movada poemo kiel la poemo de Zamenhof. Ankaŭ ĝin oni ofte kantas je solenaj okazoj (laŭ muziko de la pola komponisto Baranski). La poemo esprimas la optimisman entuziasmon de la poeto pri la lingvo. La tono diferencas de la Zamenhofa en La Vojo. Zamenhof antaŭvidas longan kaj penigan laboradon por venkigi la lingvon:

*L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.*

Grabowski vidas la venkon de la lingvo en tuja proksimo:

*Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!*

*Post longa migrado sur dorna la voj'
Minacis nin ondoj de l' maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
Al verda haven' de l' homaro.
Post longa batalo, maldolĉa turment',
La stela standardo jam flirtas en vent'.*

*Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',*

Nek ies perfidoj subitaj.
Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.
La mond' aliĝos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'.

La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.
Kaj same fidelaj al hejma altar',
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.

En ĉiu mondparto, en ĉiu ter-zon'
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson',
Do kantas de l' tero ni filoj:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!

Mi devas diri, ke ĉi tiu kanto ĉiam sukcesis kapti min, eĉ pli ol la plej honorinda La Espero de Zamenhof. Ĝia intensa pelforto instigas al plenpulma kantado, al fervora marŝado antaŭen ĝis la fina triumfo – jes, Grabowski estas mia homo!

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/grabowski.html>

Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Ĉu ekzistas civilizo enmonde?!

Mia filo, studento pri historio
iutage tute desaponta
demandis min: Ĉu vere ekzistas
civilizeco en nia mondo?!
Vidante ke prave oni fieras
pro verkoj kiuj ege nin ravigas
piramidoj, gigantaj konstruaĵoj
ligantaj marajn bordojn pontoj.

Mirindaj longaj tuneloj,
konstruitaj sub la marakvoj,
transpasantaj iun ajn imagecpovon
kiam ligas kontinentan randon.

Kiom sennombraj civilizoj
praaj, eksterordinaraj
laŭ paso de tempo jam enterigitaj
sekvataj de pli postaj.

En la historiaj lernolibroj
senfine laŭdoj, estas faritaj himnoj
ĉar pereis aliaj civilizoj
ĉar oni fieras ke mortiĝis milionoj,

Ĉiam ni restas ravitaj
pro statuoj de la pratempo
pro atingita perfekteco
plej alta indiko de genieco.
Kia indiferenteco pri originaloj
de ĉi tiuj ordinaraj statuoj

ŝajnas nin tute kutima
kiam oni sklavigas aŭ murdas.

Oni ne parolas pri civilizo
kiam Dia kreitaĵo ne valoras
konstruu senfine mirindaĵojn
sed neniam ekzistos civilizo.

Tirana , 28.11.2017

Ĉirkaŭbrako de infanoj

Tiu ĉirkaŭbrako de ambaŭ flankoj
malforta kaj fragila
havas energion ne akireblan
danke al neniuj nutraĵoj.

Danke al neniuj vitamino
ĝi ricevas amon kaj ĝojon
kiel de tiu ĉirkaŭbrako.

Ĉu ne estas vivofonto
ĝuste en tiu ĉirkaŭbrako
de ambaŭ flankoj
malforta kaj fragila?!

Eĉ mem teruro timas
pro tiu ĉirkaŭbrako
kvazaŭ diablo pro incenso.


Eĉ stratan katon
ĉi tiu ĉirkaŭbrako
turnas al tigro.

Ho, ĉi tiu ĉirkaŭbrako
kiel la reĝo Midas
iun ajn tuŝitan objekton
turnis al oro.
turnas eĉ plej ordinaran
virinon
al sankta patrino
kaj plej ordinaran viron
al patro je reĝa aspekto.

Tristo, ĉagreno, streso
trovas neanstataŭeblan
medikamenton
en tiu ĉirkaŭbrako
kaj igas ilin strata pulvoro
kiun vento forĵetas tre foren.

Sen tiu ĉirkaŭbrako
Mondo apartenus nur al lupoj.

Tirana , 2.12.2017





Ĉerizfloraj branĉoj en bokalo, tempero, 40 cm x 50 cm, 1976


Ĉi tiu bildo en temperaj farboj kreiĝis en la pentrorondo, kiu renkontiĝis en la klubodomo de la vilaĝo Zschornowitz. Ĉiuvendrede je la 16-a horo, antaŭ la pentrado, la anoj de la rondo renkontiĝis en la restoracio de la domo, kie ni unue manĝis omleton aŭ boligitan kolbason kaj trinkis glason da biero. Post la bona manĝo ni supreniris en la atelieron, kiu estis en la plej malantaŭa angulo de la klubodomo. Nia arta estrino Elsa Dietzel (ano de VBK, la GDR-a vidartista asocio), venis kune kun sia populara edzo Theo Dietzel, desegnisto ĉe la gazeto FREIHEIT (ankaŭ VBK-ano). Iu starigis ĉerizarbajn branĉojn en konservobokalo kiel nian pentromotivon.

En mia fako de la grafika ŝranko en la apuda ĉambro, mi trovis pentroplaton kun fonfarbo sur ĝi en la formato 40 cm x 50 cm. En tiu tempo mi preferis temperajn farbojn.

Unue mi pentris bluan fonon, kiun respegulas ankaŭ la motivo. Mi imagis, ke la bokalo staris sur blanka fenestrobreto kontraste al la blua ĉielo. Fakte ĝi staris sur malhelbruna ligna tablo.

Mi komencis komponi la branĉojn per malhelbruna farbo. Por tio mi plene uzis la tutan areon, kiu estis disponebla por la bildo. La bokalon mi unue indikis tiel, ke la branĉoj travideblis tra ĝi. Poste mi pentris la blankajn ĉerizajn florojn al tiuj branĉoj kaj fine la foliojn en pluraj nuancoj de verde – de hela kaj printempeca ĝis pli malhela kun “enplektitaj” nuancoj de ruĝ-bruno. La pentrado devis iri rapide. Mi bone sciis, ke mi devos finpentri la florojn ene de 2 horoj, ĝis la forveturo de la vespera buso, ĉar la floroj falos de la branĉoj antaŭ la venontvendreda renkontiĝo. Kaj tiel okazis. La venontan vendredon, la branĉoj staris tie nemovitaj kaj bonstataj, sed la floroj kuŝis sur la

tablo velkitaj. La akvo en la bokalo iom malplimultiĝis kaj pro la varmo en la ateliero jam malbonodoris. Mi pentris la branĉojn plastike, kun interesa osteca aspekto, surmetitaj en griz-blua kun lumo kaj ombro. Tion mi faris la duan vendredon, ĝis la buso forveturis.



La trian vendredon mi pentris la bokalon tiel, kiel ĝi staris antaŭ mi kaj kiel mi vidis ĝin kun lumreflektoj – tiel, kiel la helaj floroj kaj la verde de la folioj briletis en la bokalo. Por ke la bokalo havu bazon, bezonatis sub ĝi ombro elipsoforma kaj travidebla. Sub tio formiĝis mola, preskaŭ hel-viola ombro. Ankaŭ por la malfermaĵo de la bokalo, mi devis atenti la elipsan formon. En la blanka fenestro troviĝas helaj nuancoj bluaj kaj flav-verdaj, tiel ke la bildo aperas kiel kolora unuo. En la bildo plej impresas la kontrastoj de forta blua ĝis blanko kun multaj interaj trajtoj.

En 1976 tiu bildo estis por mi nova aventuro, eksperimento. Fakte, mia specialaĵo estis bildoj pri homoj, portretoj. Kompreneble mi ankaŭ amas florojn kaj la naturon. Mi volis provi ĉion, ĝuante la rigardadon.

Postparolo

La bildo trovis lokon ĉe mia filino Jana en la nordgermana urbo Eckernförde, en la ŝtuparejo antaŭ ŝia apartamento, sur blanka muro kaj kun bluaj kaheloj sub ĝi.


-- tradukis Martin Brüggemeier en Ahaus, Germanio

de **Helga Plötner**, portretistino, el Germanio

Pandemio : UMEA

Interese estas observi, ke en la nuna situacio elpaŝas kun informoj kaj komentoj kaj estas intervjuitaj multaj Esperanto-parolantaj medicinistoj, kiuj ankoraŭ ne estas membroj de nia **UMEA**. Aliĝo al UMEA ja eblas senkosta! Por havi fortan pozicion por konvinki la ekstermovadan medicinan mondon de la avantaĝoj de Esperanto, ni bezonas multajn membrojn. Do bv. instigi la nun aperantajn verdajn medicinistoj aliĝi al UMEA! Aliĝo eblas per retletero al umea@uea.org kun la deklaro de la intenco kaj diskonigo de la poŝtadreso, por nia membreregistro.

Kun koraj salutoj,
Christoph Klawe



Perfekta Civitano

Gladion la tria, grandmonarko de Bergengocio, sidis sur sia tronseĝo, kiam la kortegano plankenĵetis sin kaj per sia frunto tuŝante la tronŝtupon raportis, ke la plejmoŝta ordono estas plenumata: Majstro zem Fabius estas alvenigita.

- Envenigu lin - diris Gladion, la grandmonarko.

La kortegano ekstaris kaj profunden kliniĝinte dorseniris, malaperante tra la pordo. Post momento enpaŝis Majstro zem Fabius.

Li plankenĵetis sin antaŭ Gladion, per sia frunto li ektuŝis la tronŝtupon.

- Gloro al vi, Gladion la tria, grandmonarko de Bergengocio!

La grandmonarko gracplene ekbalancis sian kapon.

- Mi permesas al vi starante aŭskulti miajn vortojn.

Fabius ekstaris.

- Senfina estas via graco, sinjoro!

- Vi pravas. Ĉar mi ankoraŭ ne senkapigis vin, kvankam vi jam delonge meritis tion. Espereble vi tre bone konas vian kulpon?

- Indulgon al mia kompatinda animo, sinjoro!

- Mi postenigis vin kiel kortegan ĉefmetiiston, ĉar mi konis vin lerta majstro de ĉiuj metioj. Komence vi fakte taŭgis al tiu honorigo. Vi konstruis al mi tronseĝon, en kiun mi ensidis kaj eksonis leona hurlado kaj floroj pluvis el la plafono sur min. Sub la sofono de mia dormsalono vi konstruis klappordon, per kiu mi povis faligi miajn enuintajn amatinojn en profundakvan puton. Vi ĥemiis venenon, pro kiu niaj gastoj nur post hejmeniro serviviĝis. Kaj mi abundigis vin per miaj gracoj. Mi permesis al vi kudrigi violkoloran butonon sur vian ĉapelon, mi rajtigis vin skribi antaŭ vian nomon: "zem". Mi permesis al vi, ke en kortegaj baloj vi mem forviŝu la polvon de sur la

pantofloj de mia filino, princino Magnezia Karamella Lenia. Mi eĉ permesis, ke dum la datrevenoj de mia kronumado post la landjuĝisto tuj vi tuŝu la piedestalon de la statuo de la imperia Ibis-birdo. Ĉu estis tiel, aŭ ne?

- Senfina estas via graco, sinjoro!

- Kaj antaŭ unu jaro mi komisiis vin konstrui al mi la idealan civitanon. La maŝinhomon, en kiu koncentriĝas ĉiuj virtoj de la subulo. Sed mi postulis pretigi ĝin dum unu jaro, se ne, vi senkapigis.

- Senfina estas via graco, sinjoro!

- Nu, vi esperigis min dum unu tuta jaro. Sed antaŭ unu monato - diris li per akriĝanta tono -, vi jam petis permeson iri al eksterlanda studvojaĝo por pristudi la tieajn meĥanismojn. Ĉu estis tiel, aŭ ne?

- Tiel estis, sinjoro.

- Tie-e-el? - diris malice Gladion. - Sed vi ne povis min superruzi! Mi jam konjektis, ke vi intencas nur savi vian kapon ĉar la meĥanismo ne pretiĝis. Aŭ eble, ĝi pretiĝis kaj vi intencas ties sekreton vendi al miaj aĉaj malamikoj en Operencio. Do, mi ne lasis vin forfuĝi.

- Kaj mi obeeme restis hejme.

- Jes! - ekridis Gladion. - Nur vi ankoraŭ ekprovis vizitvojaĝi al la operencia internacia foiro. Sed jam tutegala kaj neinteresa. Pasis la jaro kaj mi ne plu atendas, - diris li severe kaj subite ekkriis:

- Ĉu pretiĝis la ideala civitano aŭ ne?

- Jes, sinjoro, ĝi pretiĝis.

Gladion surpriziĝis kaj kun multe pli mola tono, sed ankoraŭ dubeme demandis:

- Ĉu vere...? Kaj kiam mi povas vidi?

- En ĉi tiu momento, sinjoro. La maŝinhomo staras antaŭ via moŝta pordo kaj atendas vian ordonon.

- Enportu ĝin.

- Majesta moŝto, vi mendis idealan civitanon, do ĝi obeas nur al viaj ordonoj. Envoku ĝin vi mem per ĝia nomo.

- Kiel ĝi nomiĝas?

- Ĝia nomo estas: Mizerius.

- Bone - diris Gladion kaj ekkriis - Mizerius, enpaŝu!

La pordo malfermiĝis kaj envenis Mizerius per rigidaj, malrapidaj paŝoj. Ĝi ekstaris antaŭ la trono kaj komencis kliniĝadi, balancante sian trunkon supren-malsupren kaj senĉese knaris.

Gladion rigardis ĝin dum iom da tempo, sed fine demandis:

- Kial ĝi kliniĝadas senfine?

- Ĝia spino estas el la plej delikata kaj plej mola

gumrubando.

- Kaj ĉu ĝi ne ŝiriĝos?

- Kontraŭe, ĝi eltenas eĉ la plej grandan ŝarĝigon de vi.

- Ĝi murmuris malagrable. Preskaŭ ĝi ploras.

- Ju pli vi ŝarĝigos ĝin, des pli malmulte ĝi murmuros kaj ploros.

- Ĉu ĝi ne bezonas ŝmiradon?

- Ĝi servas sian monarkon sen ŝmiron. De aliuloj ĝi jam pretendus la ŝmiradon.

- Kaj ĉu ĝi ne povas paroli?

- Ĝi scias, - diris Fabius kaj turniĝante al Mizerius li laŭte silabis: - Ek-pa-ro-lu, Mizerius!

La maŝinhomo tuj ekparolis per kreskanta voĉo:

- Vivu la genia kaj indulga monarko de Bergengocio, kiu venkis sian aĉan antaŭulon kaj gvidas la popolon sur la vojo de la feliĉo!

Gladion plaĉe kapbalancis sed rimarkis:

- Kial ĝia voĉo krakas tiom malbele?

- Ĉi disko jam estas eluzita.

- Sed kial? Vi ja pretigis la maŝinon nur lastatempe!

- Jes, sed la diskon mi aĉetis dum la regado de via malbenita antaŭulo, sed eĉ tiam ĝi estis jam eluzita ĉar ĝi pretiĝis dum la regado de ties antaŭulo, kiun via aĉa kaj kruela antaŭulo ŝtiparmortigis.

- Ĉu vi ne trovis pli novan diskon?

- La disko estas malnova kaj eluzita, sed ĝi estas eksterordinare longdaŭra. Hodiaŭ ĝi estas same uzebla, eĉ pli ĝi taŭgos krome dum kelkaj dinastioj.

- Ĉu ankaŭ mi povas demandi ion de ĝi?

- Nature.

Gladion silabante demandis al Mizerius:

- Ĉu vi estas kapabla eĉ fajreniri je mia ordono?

Mizerius senvorte turniĝis kaj ekiris al la fajroplena kameno. Fabius saltiris al ĝi kaj apenaŭ li sukcesis ĝin reteni.

- Ho, monarka moŝto, - li diris al Gladion - ne deziru tian eĉ en la formo de demando, ĉar ĝi tuj plenumas ĉiun vian deziron.

- Nu bone, - diris Gladion. - Mi demandos alian.

Kaj turniĝante al Mizerius, li demandis:

- Diru, Mizerius, kioma horo estas nun?

Mizerius per la sama, krakanta tono respondis:

- Vivu la genia kaj indulga monarko de Bergengocio, kiu venkis sian aĉan antaŭulon kaj gvidas la popolon sur la vojo de feliĉo.

- Ĉu ĝi denove gramofonas la saman? - demandi kolerete Gladion. - Ĉu ĝi scias nenion alian?

- Ĝi ja scias. Ĝi iradas tien-reen, laboras tute laŭ

vi ordono. Vi povas ĝin eĉ enjugi.

- Kaj krome?

- Krome nenion.

- Ĉu ĝi scias nenion kiome?

- Ne forgesu, sinjoro, ke vi mendis idealan civitanon.

- Sed kio kreas en ĝi la vortojn?

- La disko, sinjoro.

- Ĉu ĝi ne povas pensadi?

- Pensadi?! Dio gardu nin!

Gladion cerbumadis kaj post kelkaj momentoj demandis:

- Sed manĝi! Ĉu ĝi ne kapablas manĝi?

- Ĝi ne kutimas manĝi, sinjoro.

- Ĉu ne kutimas manĝi?

- Mi ripetas, sinjoro: vi mendis idealan civitanon.

- Do, ĝi tute ne nutriĝas?

- Ĝi ja nutriĝas, sed nure per papero, sur kiu estas skribaĵo. Tiu estas multe pli ekonomia, ol la pano.

- Vere interesa. Nu, ni ekprovu.

Gladion prenis libron, el kiu li elŝiris folion kaj transdonis ĝin al Fabius:

- Manĝigu ĝin!

- Pardonu sinjoro, sed ĝi enakceptas nur, kion vi mem igas en ĝin.

- Bone, - kaj Gladion turniĝis al Mizerius. - Enakceptu ĉi paperon, Mizerius!

Mizerius transprenis la folion, enbuŝigis kaj englutis lin. Poste ĝi eksonis per monotona voĉo:

- Der Vater ist gut, die Mutter ist auch gut... der Vater ist gut, die Mutter ist auch gut...

Kaj tiel ĝi ripetadis la saman sentencon, ĝis la pacienco de Gladion elĉerpiĝis kaj superkriante la maŝinhomon, li demandis al Fabius:

- Kia difekto okazis en tiu?

- Bonvolu montri la libron, sinjoro.

Gladion transdonis la libron, Fabius enrigardis kaj tuj malkovris la kaŭzon.

- La afero estas komprenebla. Ĉi tiu estas germana gramatiko.

- Sed mi ne volas ĉiam ripetigi la saman tekston!

- Donu al ĝi alian paperon, sinjoro.

- Bone. Jen, tiu skribaĵo. Mizerius, enakceptu ĝin!

Mizerius eksilentis, transprenis la skribaĵon, enbuŝigis, formanĝis kaj samtone ekparolis:

- Senvualigu la perfidulojn!

Kaj Mizerius ripetadis senfine ĉi sentencon, ĝis Gladion jam kolere superkriis ĝin:

- Kia difekto denove?

- Kion vi donis al ĝi, sinjoro?

- La raporton de la policministro.

- Tiam ne primiru, sinjoro.

- Sed mi ne volas, ke ĝi pluparolu! Kion fari por silentigi ĝin?

- Tio estas tre facila: Vi devas piedbati ĝin.
- Ĉu piedbati? Kaj ĉu ne ĉesos funkcii?
- Ju pli vi piedbatos ĝin, des pli fervore ĝi servos a vi.

Gladion dubeme rigardis al Mizerius, sed fine li venis malsupren de la trono, iris malantaŭen al la maŝinhomo kaj tie piedbatis ĝin. Mizerius ekŝanceliĝis kaj terenfalas. Gladion iome ektimiĝis.

- Jen! Ĝi nun falis!

- Ĝi ne falis sinjoro, nur kuŝas. Al ĉiu ĝi ekkuŝas kiu piedbatas ĝin.

Sed Gladion estis ekkaptita de penso. Li nur staris kaj cerbumadis. Fine, post iom da hezito li ekparolis:

- Sed atentu nur! Kiaspeca molaĵo estis tiu...

Fabius ektemis kaj ruĝiĝis.

- Kiu, sinjoro? Kio?

- Sur la dorso de la maŝinhomo. Kiam mi alpiedbatis... do, tie ĝi estis tre mola...

Fabius embarase ekbalbutis:

- Kial...? Nu, do... Kial ĝi estas mola? Ho... Mi plenigis ĝin per mola lano por pliagrabli al vi la piedbaton.

- Fakte, ĝi estis agrabla...

- Ho, - diris Fabius rapide kaj ĝojante, ke li sukcesis eviti la danĝeran demandon, - kiu nur unufoje piedbatas ĉi perfektan civitanon, tiu ekhavas pasion al tiu majesta amuzo. Ĝuste pro tio mi aplikis la plej molan ledon sur la malantaŭa parto. Dikan ledon

mi aplikis nur sur la vizaĝo...

Sed Gladion profunde enpeniĝis kaj mansigne silentigis la majstron.

- Tamen, - li diris graveme. - Iom stranga...

Li aliris la maŝinhomon, ekpalpadis ĝian manon kaj subite ekkriis:

- Ĝi ja estas varma!

Poste li profunden kliniĝis al Mizerius, kiu kuŝis sur la tero, sed tuj li ekstaris kaj per tondra kolero li kriis al Fabius:

- Ĝi ja spiradas! Vi kanajlo, vi trompis min! Ĝi estas vivanta homo!

Fabius genufalis antaŭ Gladion.

- Indulgon al mia povra kapo!

- Vi aĉulo! Vi perfidulo! Kiel vi aŭdacis trompi min, kanajla fripono?!

- Ho, pardonu vi, indulga monarka moŝto! Mi dum

unu jaro senĉese konstruis maŝinon post maŝino, mi serĉis, studadis la meĥanisman de la ideala civitano, sed fine mi devis konvinkiĝi, ke ĝi estas absurda kaj mi neniel kapablas plenumi ĉi taskon. Vi postulis neeblaĵon de mi, sinjoro. Neniam, nenispeca maŝino povos tiom multe plenumi! Tiom multe povas plenumi nur la animhava, konscioplena, vivanta homo!

(1956)

Fonto: <http://esperanto-mv.pp.ru/Szathmari/index.html>

Neandertalaj homoj plu vivas (4)

Ne nur en Himalajo la tie nomitaj « jeti » renkontiĝis, fakte ankaŭ en antikva kaj mezepoka Eŭropo estis atestaĵoj kaj bildaj spuroj de ties ĉeesto, pri tio eble posta artikolo parolos. Ĉi foje mi montros, ke en tuta centra Azio estas atestaĵoj pri ili!

„*lu speco da nasnas-o (estaĵo komparebla al latina Faŭno) renkontiĝas en regiono Bamir (Pamiro), senhomejo inter Kaŝmiro, Tibeto, Vaĥano (1,) kaj Ĉinio. La nasnas-oj estas felkovritaj, krom sur la vizaĝo, kaj saltegas kiel gazeloj. La Vaĥananoj ĉasas kaj manĝas ilin.*“

[el la libro *Ŝaraf al-Zaman de Tahir Marvazi, araba vojaĝisto en la XII-a jarcento*]

„*La besto plej nobla estas la nasnas-o, vivanta en la ebenaĵoj Turkestan-aj, kun ungoj larĝaj kaj plataj. Kie ajn ĝi vidas homojn, ĝi sekvas ilin kaj rigardas al ili. Kaj kiam ĝi trovas homon solan, ĝi forkaptas lin aŭ ŝin, kaj laŭdire eblas, ke ili gekoncipu kune. Post la homoj ĝi estas la plej supera estaĵo inter*

verkis kaj sendis Roland Platteau, el Francio

la besta regno, tiomtiom ĝi similas al homo : unue per sia dukrura rekta staro, poste per la larĝeco de siaj ungoj, finvice per siaj haroj surkape. »

[el la libro *Ŝahar Makala de Nizami al-Arudi, persa sciencisto en la XII-a jarcento*]



Atestaĵo de ĉef-majoro Miĥajl Topilski (1925) :

«Dum aŭtuno 1925 mia taĉmento estis operacianta persekutserĉante gerilan bandon kontraŭsovetan en okcidenta Pamiro.

Survoje tra la vilaĝoj alt-montaraj en distrikto Vanĉ ni estis aŭdintaj rakontojn pri best-homoj vilaj kaj monstraj (la « dev » -oj de la persaj kaj taĝikaj malnovaj legendoj) vivantaj en la montaraj. Laŭ la lokaj kredaĵoj renkonti la estaĵon, vidi ĝin kaj aŭdi ĝiajn hurlojn, ĉio tio altiras malbonŝancon kaj anoncas morton. Ni tute ne atentis tiujn rakontojn.

Ni sekvantaj spuron de la bando laŭlonge de montarpado, kaj atingintaj limon de la eterna neĝo, ni ekvidis paŝosignojn traŭrantaj trans la pado ; Nia

hundo malkonsentis ilin sekvi. Ili estis tute netaj, kaj kojekteble faritaj de homa nuda piedo. Ili finiĝis 150 metrojn pli poste, ĉe la bazo de roka klifo kruta, malfacilege grimpeblaj de homo. Post detala esploro nia kuracisto taksis, ke ili estis nediskuteble homaj.

Pluirantaj nian persekutserĉadon, ni reatingas la elĉerpitajn restulojn de la gerilula bando, haltintaj por ripozeti en groto malfermanta en rokklifo superita de glaciario kvazaŭpendanta super ĝi. Ni preterĉirkaŭas ilin silente kaj ekokupas pozicion pli altan ol ilia. Mitralon ni direktas al ili. Apenaŭ ni estis ĵetitaj unuan granadon viro eliras el la groto kriante, ke la pafoj igos la glaciaron disfali, kaj tial ĉiuj estos egale enfositaj. Ni postulas al ili kapitulaci. Li petas havi tempon por pridiskuti la aferon kun siaj sampartianoj kaj reeniras la groton. Malmulte da tempo poste ega krakbruo aŭdiĝas, dum la glacio ekmovetas. Preskaŭ sammomente ni aŭdas pafojn, kaj en la dubo ni kredas pri sturmo de ili. Neĝ- kaj glac-pecegoj ekfaladas de la klifo kovrante pograde la eniron de la ŝirmejo. Kiam ĝi estis preskaŭ tute ŝtopita, tri viroj sukcesis eskapi, la aliaj (ni poste lernis, ke ili estis kvin) estante enfositaj. Ni mortpafis du, kaj severe vundis la trian. Konstatiĝis, ke tiu kaptito estis uzbeko, posedanto de tetrinkejo en Samarkando.

Li rakontis, ke dum ili estis pridiskutantaj nian kapitulacipostulon pluraj vilaj estaĵoj homsimilaj eliris el fendego de la rokmuro, ili estis armitaj per bastonoj. La viroj provis sin defendi pafante. Nia kaptito ricevis baton surŝultre dum li estis fuĝanta elirejen postkurata de unu el la monstroj. Tiu estis mortigita kaj superkovrita de falanta neĝamaso.

Ni provis kontroli tiun strangan rakonton. Ni petis lin ke li montru la precizan lokon, kaj ni forfosis la neĝon. Ni verfakte trovis la korpon. Ĝi estis ricevinta tri kuglojn. Unuavide la kadavro ŝajnis estis tiu de antropoida simio : ĝi estis tutkovrita per haroj. Sed mi ja sciis, ka tiaj simioj ne ekzistas en Pamiro. Kaj la korpo fakte aspektis pli bone al tiu de homo. Ni tiris la harojn kaj konstatis, ke ili vere estis la naturaj haroj de la estaĵo.

Tio estis vira individuo 1,70 metrojn alta, iom maljuna, kun haroj kelkie griziĝintaj. La haroj estis pli longaj sed pli maldenskreskaj sur la brusto, pli mallongaj kaj pli densaj sur la ventro. Estis malpli da haroj sur la gluteoj, el tio nia kuracisto deduktis, ke la kreitaĵo kutime sidis, kiel homa estaĵo. La koksoj estis pli vilaj. La genuoj estis tute nudaj kaj kovrita per kalaĵoj. La tuto de piedoj, inkluzive de la supraĵo, estis sufiĉe senhara, kovrita per haŭto malmola kaj bruna. La ŝultroj kaj brakoj estis egale kovritaj per hararo, kies dikeco malkreskis al la manoj. La manplatoj estis tute senharaj kun nur kaleca haŭto.

La vizaĝo estis malhela, kaj la estaĵo havis nek barbon nek lipharojn. La malantaŭa flanko de la kapo estis kovrita per tre densaj implikitaj haroj. La kadavro kuis okulojn malfermaj, la dentojn videblaj ; La okuloj estis malhelakoloraj, la dentoj grandaj kaj homeceformaj. La frunto estis simiece klina, la brovostoj ege elstaraj. La altaj zigomoj similigis ĝin al mongolo. La nazo, kies radiko estis tre enprofundigita, platis. La oreloj estis nudaj, kaj iom pli pintformaj ol ĉe homa estaĵo. La malsupera makselo estis fortega. Ĝi havis potencan bruston ege muskolriĉan. Ni ne trovis ian ajn netan malsimilecon al homo. La seksorganoj estis tutsame al viro. La braklongo normalis. La manoj iomete pli longaj kaj la piedoj multe pli larĝaj ol ĉe la homoj.

Ni malsciis, kie ni troviĝas ekzakte, ĉar tiam ne ekzistis ĝusta mapo pri Pamiro. Tamen ni kojekteble estis ie inter la Jazgulem-o kaj la montarvico Ruŝano. Ĉar nia komisio estis plenumita, ni estis returnontaj. La naturo de la mortigita estaĵo problemis al ni. Sed ne eblis al ni kunporti ĝin laŭ la malfacilega vojo, kiun ni estis sekvontaj. Kaj ni timis ekhavi al ni problemoj kun la loĝantaro : ni ja povus diri, ke ni portas beston, sed vere tio tro multe similis kiel homon. Ni pensis senhaŭtigi ĝin por kunporti la haŭton, sed ja tio tro pensigis je senhaŭtigi homon. Fine ni decidiĝis enterigi lin tie, kie ni trovis lin.

Ni direktis nin al sudo forlasante kiel eble plej frue la montojn, kaj transiris riveron (kojekteble la Panĉ-o). La nemultaj loĝantoj de tiuj aliaj montoj, baluĉoj, miris vidi nin, kaj demandis nin, kiel do ni povis eskapi el tiuj regionoj supozitaj esti loĝataj per homaspektaj homoj.

Ni eksciis per la baluĉoj abundajn aliajn detalojn. Ili diris al ni, ke la vilaj homsimilaj estaĵoj estis vidataj ne nur solaj sed ankaŭ duope kaj iomfoje kun ido, sed neniam ili iris per pli ampleksaj grupoj.

(1) *ankaŭ vortita Wakhan, or Wakhan koridoror, montara kaj pattenilforma regiono en la Pamira Monsistemo of ekstreme nordokcidente de Afghanio. Ekde la determino de la afgana landlimo (1895–96), tiu konsistigis strategia interzono inter tiam Rusia, Turkestano. Tiam brita Hindio kaj Cxinio. Vaĥan rivero fluas okcidente orienten tra vaĥan laŭlonge 160 kilometrojn.*

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearmila mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinaraj armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.

Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj. “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

6) Apud stakigitaj kadavroj mi kremaciis mian patrinon

(Verkita de s-ino Namiki Kajoko 88-jara, loĝanta en Tokio, tradukita el la artikolo de la ĵurnalo Asahi la 19an de oktobro 2019)

Mia familio translokiĝis al Hiroŝima de Tokio, ĉar mia patro komencis labori en la filio de asekura kompanio en Hiroŝima. Komence ni vivis tre agrable en milda klimato kaj kun bongustaĵoj, sed baldaŭ la situacio fariĝis tre kriza. Ni ne sciis, kio okazos al nia vivo, tial la patrino ĉiam portigis al mi cent-enan monbileton kudritan en mian zonon, montris al mi kiel kuiru, kiel kudri, kiel porti pezajn pakaĵojn ktp. kaj ĉiam diris al mi, “Kiam ni gepatroj mortos, vi devos gardi viajn junajn fratinojn kaj reveni al nia hejmloko Tokio”.

Kiam mi estis 14-jara, la urbo estis bombita per atombombo. En tiu tago mia patrino estis en la centro de la urbo, mobilizite por malkonstrui domojn por malhelpi fajron disvastiĝi okaze de aeratako. Mia patro estis ankoraŭ hejme kaj legis ĵurnalon. Mia juna fratino ial ne volis iri al la lernejo kaj restis hejme. Ankaŭ mi estis hejme, ĉar ne estis laboro en la fabriko de armiloj, al kiu la lernantoj estis mobilizitaj.

Kiam mi estis apud la fenestro por fari fajron en forno, eklumegis. La fenestroj rompiĝis kaj pli ol 20 pecoj el la vitro pikiĝis en mian kapon. La patro eltiris min kaj mian fratinojn svenintajn el sub la detruita domo. Li, portante mian fratinojn sur la dorso, kaj mi nudpiede direktis nin al rifuĝejo, nome la najbara templo. Tie mi trovis mian patrinon. Ŝi brulvundiĝis sur la tuta korpo. Poste ŝi suferis pro lakso kaj sangado, kaj post 20 tagoj ŝi mortis. Ŝi diradis al mi, “Vi gardu viajn fratinojn”.


En la najbara vaka tereno estis montoj da kadavroj, sur kiuj oni surverŝis benzinon por bruligi tiujn. Ni volis mem kremacii la patrinon, do ni kolektis brullignojn kaj kremaciis ŝin.

En la venonta jaro mi fariĝos 90-jara. Estas nur lastatempe, ke mi povis rakonti pri tiu pezega kaj obseda sperto.

Post la morto de mia patrino ni loĝis en kabano konstruita de mia patro najbare. Li sternis tavolo herbojn sur la planko kaj la kabano estis apogita per mallongaj lignoj, kaj ĝia tegmento estis kovrita per bruligitaj zinkitaj ladoj kolektitaj en la ruino. Mia patro amis montgrimpadon, kaj lia tia sperto utilis. Niaj najbaroj kaj parencoj sinsekve translokiĝis al siaj konatoj kaj parencoj, sed ni ne havis tian konaton, do ni restis tie ĝis la fino de oktobro.

Meze de aŭgusto mia fratino revenis de la rifuĝejo en kampara vilaĝo kun instruisto s-ro Jamada. Ŝi estis tre maltrankvila, ĉar povis okazi, ke ŝiaj ĉiuj familianoj mortis. Ŝi estis tre ĝoja, vidante min apud la eksa domo. *(Tiun tempon la registaro ordonis, ke la elementlernejoj en grandaj urboj rifuĝu en kamparaj vilaĝoj. La vivo tie estis tre severa por junaj lernantoj pro manko de sufiĉaj manĝaĵoj kaj pro manko de prizorgado de gepatroj. Post la milio iuj trovis, ke ĉiuj iliaj familianoj mortis en atombombado aŭ aeratako. Ili fariĝis orfoj.)*

La 15an de aŭgusto, ne aŭdiĝis averta sireno pri aeratako. “Kial?”, mi demandis min. Baldaŭ mi aŭdis, ke Japanio malvenkis. Mi estis ĝoja, ke mi ne plu bezonas timi pafadojn el aviadiloj. Eĉ nun mi bone



memoras la pafadbruojn.

Oni diris, ke pro la veneno el tiu novstila bombo ne kreskos herboj dum la sekvantaj 75 jaroj sur la tero, sed post unu semajno jam ekkreskis herboj. Ni plukis ilin, volvotigojn de batatoj, foliojn de kukurboj kaj ĉiajn manĝeblaĵojn. Ni kuiris ilin en ferkasko kaj uzis akvon elŝprucantan sur stratoj.

Pli kaj pli kuraciĝis vundoj de vitraĵoj sur la kapo. Ankaŭ en mia dekstra korpo enpikiĝis vitropecoj. Malgrandajn mi mem elprenis. Kiam la korpo kuraciĝis, la pecoj mem aperis kaj falis. Vundo sur la malantaŭa kapo estis iom serioza, sed ne estis medikamento hejme krom jodoformo. Mi iris al la kuracejo. Ankoraŭ nun mi sentas ion malnormalan tie.

Kiam mi revenis al Tokio du jarojn poste, mi vizitis la hospitalon de la universitato Tokio, sed la kuracisto forpelis min, pretekstante, ke li ne havas sufiĉan informon pri la atombombo. Mi volis kuracadon nur pri la vundoj de vitropecoj, kiuj ne havis rilaton kun la atombombo. Mi pensas nun, ke jam tiutempe komenciĝis diskriminacio al la atombombitoj.

Komence de septembro mi suferis pro serioza lakso. Mia patro iris al apoteko en la distrikto Eba, kiu

ne suferis pro la fajrego post la bombado. Li aĉetis geranion kaj hejme infuzis ĝin en la ferkasko. La sekvantan tagon, danke al ĝi aŭ danke al mia forta korpo, mi saniĝis. Kiam mi resaniĝis, mi vidis la plenan lunon en malluma ĉielo. Ĝi donis al mi grandan kuraĝon.

Poŝto ekfunkciis. Mia patro estis okupita pro refunkciigo de la kompanio. Najbare estis mia samklasanino, kies patrino mortis en la malkonstruata laboro de domoj same kiel mia patrino kaj mortis kun siaj du filinoj.

Meze de oktobro ni translokiĝis al la domo en la distrikto Kaita. En la unua etaĝo estis oficejo de la asekura kompanio kaj en la dua etaĝo ni loĝis. Mi komencis viziti la superan mezlernejon Kaita kaj miaj fratinoj vizitis la urban elementan lernejon. En Kaita najbaroj tre afable traktis nin. Ni povis reakiri homan vivon tie.

Mi ne povas forgesi diversajn spertojn en tiuj jaroj. Ni estas feliĉaj, ĉar neniu el ni malaperis. Mi sentas feliĉon, ĉar mi ne plu spertis militon dum la pasintaj 70 jaroj.

21>>

diskutas pri vampiroj kaj la viruso en la instituto. Post tio la pesto forprenas unu post la alia siajn najbarojn, sian edzinon, sian filinon ktp. Li fariĝas tutsole vivanta viro. Sed kial nenio okazas al li? La pesto ne trafis lin. Li ne fariĝis vampiro aŭ zombio. En la fino de la filmo ni malkovras, ke antaŭ jaroj, kiam li laboris en Panamo li estis mordita de vesperto kaj tiel antikorpaj aperis en sia sango. Iutage li alportas hejmen vunditan duonzombiion, kiun li trovis ekstere sur la herbejoj kaj injektas sian sangon al ŝi kaj tiel li savas ŝin. Ĉi tiu nigra blanka filmo kun la mistera muziko kaj monotonaĵoj pluiras en pli malrapida tempo ol la antaŭa filmo. Sed tamen ĝi estas spektinda. Vincent Price la karisma aktoro de la iamaj timigaj filmoj, kun sia longa vizaĝo kaj penetrantaj rigardoj faras la filmon spektindan. Sed mi scivolemas pri io, kial la ajloj dum tri jaroj ne putriĝis en la merkato, kial la kafoj li trinkas ne malfreŝiĝis. Lia ĉemizo kaj pulovero ĉiam estas gladitaj. Nia heroo ne forlasis la amon al vivo, li ĉiam vagas razita. La fino de la filmo ne estas tiom alloga kaj ĝi estas malsprita. Ankaŭ ĉi tie troviĝas scenoj de korpsobulado, uzado de armeo, kaj neado de la alproksimiĝanta danĝero de la epidemio.

Ni venu al la tria filmo!

“**Panic in the streets**” (Paniko sur la stratoj). Filmo el la jaro 1950. Direktoro Elia Kazan. Elia Kazancioĝlu estas nia samlandano, li naskiĝis en Istanbulo en familio kiu venis el Kajseri urbo, el la centro de Turkio, filo de greka familio. En la jaro 1947



en Novjorko li kun siaj amikoj establis la studion “Actors Studio”, kie trejniĝis multaj sukcesaj aktoroj, unu el ili Marlon Brando, por Holivudo kaj Bordvejo. Kazan produktis multajn sukcesajn verkojn por teatro kaj kino. En la jaro 1952 li denunciis siajn geamikojn al la komitato de Kontraŭ Usona Agado, kaj pro tio li estis dum multaj jaroj ekskluzivita de siaj multaj konatuloj. En sia biografio “Unu Vivo” li konfesis, ke li tute ne pentas pri tio. Kiu scias? Ĉar Elia Kazan tre bone scipovis la arton pri teatro kaj dramaturgio, kaj pro tio en la filmo “Paniko en la Stratoj” tre lerte spektigas al ni polican fikcion en kies fono troviĝas la danĝero de pneŭmona pesto. En ĉi tiu filmo la epidemio ŝajne estas en la ombro en la fono. Ŝajne la kontraŭbatalo de la kuracisto (Richard Widmark) kun la polica kapitano (Paul Douglas) kaj lia ĉasado de la

>>>

La maljuna riĉulo estas patro de belkreska knabino. La oldulo, kiu malemis al ĉia penado dum sia tuta vivo, ŝatas tiel multe la pigrecon, ke li rifuzas ĉiujn avantaĝajn edziĝo-proponojn, obstine deklarante, ke li konsentos doni la manon de sia filino nur al knabo pli pigra ol li.

La junulino komencas malpacientiĝi, kaj la patro bedaŭregas la degeneradon de la bonaj kutimoj, kiam iun tagon, ĝuante freŝan aeron sur la perono de sia domo, ili vidas alveni ŝajne maldelikatan junulon, kiu dorsdirekten marŝas. La maljuna riĉulo ne povas sin deteni de rido:

- Kiel vi faras tie? li demandas.

Mi venas por peti la manon de Fraŭlino via filino.

- Sed kial vi dorsdirekten marŝas?

- Por evitigi al mi la penon turni miajn kalkanojn en okazo de rifuzo!

Opiniante, ke li jam trovis sian majstron, la riĉulo tuj konsentas edzinigi al li sian filinon.

Eltiraĵo el Ridi Vjetname eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/perfekta-pigrulo/>

Vortareto

- * **bedaŭri** - sentadi ĉagrenon pro io, kion oni faris aŭ ne faris.
- * **degeneri** - perdi la originajn kvalitojn de sia raso aŭ specio.
- * **freŝa** - pura.
- * **kalkano** - posta parto de homa aŭ simia piedo.
- * **kutimo** - inklino fari ian agon, akirita pro ofta

ripetado de tiu ago.

- * **olda** - maljuna.
- * **perono** - ekstera larĝa ŝtuparo, el kelke da ŝtupoj, finiĝanta supre per plataĵo, sur kiu malfermiĝas dompordo.
- * **pigra** - mallaborema, malpenema.
- * **pigreco** - eco de iu pigra.
- * **rifuzi** - ne voli akcepti ion donatan aŭ proponatan.

>>> pro la pesto infektitaj homoj estas pli en la fronto. Jack Palance en la rolo de malbona viro, kiun siaj delokitaj vangoostoj kaj serpent-sorĉaj rigardoj, faras la filmon spektindan. La edzino de la doktoro estas Barbara Bel Geddes, kiun multaj konas el la fama tv-serio Dallas. La komuna aspekto de tiu filmo kun la aliaj estas la imago de kuracisto, kiu avertas kaj foje konfliktas kun la aŭtoritatuloj pro la alproksimiĝanta danĝero dela epidemio. Denove knabo, simbolo de la estonteco: la filo de la kuracisto. Ĉi tiu nigra-blanka filmo kvankam ne tiom de la filmo "Gripo", havas pli rapidan ritmon.

Mi ankaŭ proponas la filmon "On the beach" (sur la strando) el la jaro 1959.

Al ĉiuj miaj esperantistaj geamikoj mi deziras, ke ĉi tiu pandemio finiĝu kun la malplej granda detruo sur la popoloj.

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo 26-a de marto 2020, Büyükkada, Istanbulo

19>> Ili trovu vojon kiel eviti revoluciojn kaj militojn por krei novan mondon kiu ne endanĝerigos nin kaj la ekologian ekvilibron.

homaron, la naturo komencas venĝi sin.

Se tio ne okazos tre rapide (la unua fazo: krei novan planon kaj inviti la homaron - aparte la junularon - ekapliki ĝin), sekvas jam sekvajare nova krizego en kiu la naturo mem trovos vojon por detruo la

Marto 2020

verkis **Zlatko Tišljär** el Slovenio

Fonto: <http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/4730454>



Solvo de la krucvort-enigmo

A	MA	TO		PAN	TO	MI	MO
LA	NO		A	DO	RO		NI
BA		E	MI	RA		RE	TO
MA	LA	MI	KO		DAN	ĜE	RA

Facilaj rakontoj

Eroj el la libro „La danĝera lingvo“

Ulrich Lins

La eksterordinaran allogon de Esperanto je progresemaĵoj, kiu restis konsistiga parto de la japana movado, kiel ankaŭ la nedoktrinecan medion, en kiu la lingvo trovis malfermitajn pordojn, ilustras la fakto, ke grava ĝermo de radikala humanismo la „Societo de Novaj Homoj“ (Sinzinkai), fondita en 1919 de studentoj de prestiĝa Universitato de Tokio, prezentis sur la laŭvicaj titolpaĝoj de sia unua revuo, Demokurasii (Demokratio), la portretoj de Rousseau, Tolstoj, Marx, Kropotkin, Lincoln, Rosa Luxemburg – kaj de Zamenhof; la daŭriga revuo Senku (1920) portis la subtitolon La Pioniro. Esperanto ludis rolon ankaŭ en la unua organo de la prolet-literatura movado, Tanemakuhito, kiu vastanime kunigis diversajn revoluciemajn fluojn. Unu el ĝiaj fondintoj, la dramatikisto Sasaki Takamaru, ekuzigis la Esperantan subtitolon La Semanto por revuo ekde ĝia apero en Tokio en oktobro 1921 kaj ofte varbis en ĝi por Esperanto kiel lingva ligilo de la monda proletaro.

Paĝo 167-168

En decembro 1954 okazis en Montevideo la Oka Ĝenerala Konferenco de Unesko. Universala Esperanto-asocio estis akceptita kiel oraganizaĵo, kun kiu Unesko havas konsultajn rilatojn. Eĉ pli grave, la Konferenco akceptis rezolucion, kiu „notas la rezultojn atingintaj per Esperanto sur la kampo de internaciaj

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo“ kaj „rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko“. En la voĉdono pri tiu rezolucio la delegacioj de Soveta Unio kaj ĝiaj aliancanoj surprize sindetenis.



Paĝo 479

Oni povas konsideri progreson, ke al la homaj rajtoj lastatempe estis aldonita „rajto je komunikado“. Unesko en siaj raportoj pri nova monda inform-ordo turnas sin kontraŭ unuflanka fluo de informoj, kultura hegemonio kaj malhelpoj al komunikado. Aliflanke, en la preskaŭ 300paĝa raporto de la tiel nomata Mac-Bride-Komisiono (1980) la lingva problemo ricevas pritrakton sur malpli ol sep paĝoj. Ankaŭ Unesko ne volas riski, ke ofendiĝu la registaroj pro deklaroj pri la lingva aspekto de la internacia komunikado, kiuj estus pli ol nun tute ĝeneralaj. Sed espero restas: Esperanto vivas. Ĝia ekzisto servas kiel admono, ke en teknike kuntiriĝanta kaj pli kaj pli raciigita mondo la pli bona kompreniĝo inter la homoj ne bezonas esti utopio

Paĝo 531

La libron en la ĉeĥa traduko vi povas legi sur paĝoj www.esperanto.wz.cz kaj www.mlboleslav.cz/ esperanto. La libro enhavas historion de ĉeĥa E-movado ĝis la jaro 1986 en parto 8

Fonto: **Legolibreto 1** de Jindřiška Drahotová

Averto por la Homaro

La viruso kiu iĝis nesolvebla problemo malgraŭ ĉiuj nunaj scioj de medicino, kaŭzas katastrofon kiu kondukas al ioma halto de la nuna vivkontinueco de la homaro. Oni antaŭvidas baldaŭan ĉeson de trafiko, transporto de produktoj kaj produktado mem. La homoj jam ekpanikis, la vendejoj vendas nur manĝojn ankoraŭ kaj tiuj ĉiam pli mankas. La stato en kiu normala logiko ne plu gravas. Se vi ne havas monon, vi havas problemon, sed ankaŭ se vi havas ĝin ege multe – ne utilas, vi ne plu povos aĉeti ion ajn, se ĉiuj vendejoj estas fermitaj.

La stato en Ĉinio montras ke verŝajne la viruso malaperos post kelkaj monatoj ĉie kaj tio okazos iom post iom, same kiel iom post iom ĝi disvastiĝis.

Supozeble la medicino eltrovos vakcinon kontraŭ ĝi ĝis la sekva sezono en vintro kaj oni jam havos rimedon por kontraŭbatali la viruson.

Ĉiukaze intertempe ni havos absolute nekonatan staton de ĝenerala krizo, kian la homaro ĝis nun ne

de Zlatko Tišljar el Slovenio

konis krom en la mezepoko kiam regis epidemioj de pesto, sed temis nur pri lokaj epidemioj, ne pri la tutmondaj pandemioj.

La afero prezentas averton por la homaro, kiu jam de longe devis rimarki la katastrofon kiun ĝi kaŭzas al la naturo, al la ekologia ekvilibro de la mondo.

Ĉu fine maturiĝis la sendependa homara intelektularo por krei novan celaron forigante la centran malbenon: la misdion MONON?

Oni urĝe devas krei mondan konsorcion de saĝuloj kiu prezentos planon por la homaro sen mono kaj kapitalo kiel ĉefa celo de homa kreiveco. Ja estas videbla el granda foro ke la nuna homara organizo terure misgvidas nin: Mono kaj merkata hazardo, subtenita de armeaj potencoj kondukis nin al stato en kiu ekestis enorme malgranda tavolo de senlime riĉaj personoj kontraŭ enorme grandega tavolo de



>>19